

# La Infanoj de la vidalvida domo

*la personaj nomoj estis ŝanĝitaj de la aŭtoro mem pro diskreto*

De Sinjorino FRANCINE BOHY ĉe la eldonisto MEMORY

*tradukita de NORGA CHARLES E J*

*Mi dankas miajn amikojn.*

R DEMARCHE *por siaj konsiloj,*

Kaj Biologika Profesoro J JACOB *por la forviŝo de miaj akuzativaj eraroj.*

Mi rimarkis ĝin hazarde traŭrante la Skarbekan Straton.  
Ĝi ŝajnis ruinaĵo kaj odoris sovaĝa herbo.  
Malgranda, simpla, vera kampara domo perdita meze de la urbo:  
Tio estos mia domo.  
Mi ĝin aĉetis.

Mi farbis la murojn per sunaj kolorigloj.

En la ĉefa ĉambro, mi enmetis miajn ĉiamajn akompanantaĵojn, mian budaon kaj por lignan hejtajan fajrujon.

Mia budaon majestece ŝvebigis mildan kaj serenon etoson.

Kaj tuj la fajraodoro brakumis min.

Belege! Mi hejmiĝas.

*(Skarbeko estas komunumo en Bruselo, Belgio)*

Ha! Jes, la kvartalo.....

Mi tute forĝesis, tio ne pritentis min. Mi admiris la domon intense, mi vidis nenion alian!

Ĉu ci ne vidis tiun kvartalon? Ci ne konscias, laŭ mi.

Ne, mi ne rigardis la kvartalon:

La najbarino estas kuntirita maljuna virino, grizan kaj malbelan. Per protektanta sinteno, -ŝi avertas min.

-Atentu sinjorino, en tiu ĉi kvartalo, enestas Araboj!

-Ŝia sinteno aspektas mistakseble.

-Rigardu mian leterskatolon tute fortorditan, tion faris la infanoj.....

Ĉu vi vidas?

Mi venas de for... neniam mi vidis Arabojn apud mi!

Tiam, singardema, preskaŭ sur la piedfingroj, mian nazon mi metis eksteren, mi rigardas intense tra la strato.

Ĉie infanoj, de diversaj aĝoj. La suno brilas en iliaj okuloj.

Virinoj sidas antaŭ siaj pordoj. Ili babilas multe kaj ridas. Ili rigardas min diskrete.

-La somero komencas, aĝa viro improviziĝis tondisto. Sur la trotuaro, li instalas seĝon kaj li tondas harojn de la infanoj.

-La rondaj hartufetoj resaltas sur la teron.

-Mi ricevas sensacion de paciĝo profunde en mia koro.

La postan tagon, kelkaj kvartalanoj kuniĝis spontanece kaj observis la domon. Ĉiuj mebloj estas observitaj kun scivoleco. La infanoj senmove, atentemaj. Kvazaŭ ili sindemandis kiel la translokiĝantoj organizos sin por enirigi ĉion en tiun dometon!

Post multaj penoj, oni finfine sukcesis suprenirigi la bibliotekan meblon ĉe la unuan etaĝon....

-kiam subite aplaŭdoj venis de la strato, akompanataj de multaj bravkrioj admirantaj. Mi miras. La infanoj havas entuziasmon kaj rideton, kvazaŭ ili mem estus faritaj tiun laboron!

Kiel prezervi mian neceson de silento, de soleco, de intimeco, ĉe la kerno de tiu kvartalo kie

-eksplodas krioj, scivolemo. Mi, kiu bezonis izoli min, de tempo al tempo, fundamente en mi mem,

en ia protektanta kaj paca silento.

## **Infano falita el ĉielo.**

Por mia kvardek-kvina datereveno, mi min ofertis paron de rulŝugliloj. Mi revas pri ili ek de mia infanaĝo. Mi aĉetas la plej belan paron kiu ekzistas, el la supera lukso. Baldaŭ mi malfieriĝis. En la ĉirkaŭaĵo, mi malfacile trovas spacan lokon, kie mi povus uzi ilin. Tiam mi enhavis bonan, belan ideon.....

Mi invitas miajn nevinojn 15 kaj 17 jarojn, ĉe la maro. Mi benas mian akiron. Mi ankaŭ reĝojas pro la plezuro rulgliti kun la knabinoj de mia frato, senti la ventan kareson venitan de la maro al mia tuta korpo. Mi konkurencos ilin, mi, ilia oklino de kvardek-kvin jaroj.

La r rulŝugliloj apenaŭ ĉe la piedoj, mi malfacile povas stari. Mi tiom multe falis teren, ke mi rehejmiĝis tute penita en Bruselon.

Mi decidas kunporti la rulŝuglilojn en la oficejon, fakte mi enkapis la ideon.....

Kiam mi deĵoras, ne estas facile malkroĉi telefonon de miaj koleginoj, kiuj oficas ekstere. Mi devas kuri de skribotablo aliskribotablen. Kun la rulŝugliloj ĵ ĉe miaj piedoj, "Vere" genias. Mi atingos plej rapide la telefonojn, sen vere riski falon. Mi jam vidis min glitante sen bruo sur la planko de niaj oficejoj. Kaj rulgliti malpeze kvazaŭ mi havus flugilojn.

Tio bonegas! Rapide mi sukcese rulgliti tute lerte kun granda facileco. Kun kliniĝo de okulo, mi malkroĉas telefonojn, kun ŝvebanta lerteco. Miaj mirindaj rulŝugliloj ĉe miaj piedoj.

-Jes, ja, la sociaj verkoj..... mi aŭskultas.

Kun ĝojo mi respondas al ĉiuj telefonaj demandoj alvenitaj ĉe nia servo. Pacience, efike, mi respondas per korega voĉo! Mi fieras pri miaj rulŝugliloj. Mi sentas min kvazaŭ en infana korpo kiu ĝuas sian flekseblon. Mi sentas adoltan kapon kiu sian ĝujas viklecon. Resume, mi sentas min bonege.

Estas do preskaŭ kun ŝvebanta sinteno ke mi ricevas koleginon de la administrada ofico, kiu deziris informadon. Ŝi estis tiel mirigita kiam ŝi vidis miajn rulŝuglilojn ke ŝi kapablis nenion diri.

-Ĉu tio ne estas iom danĝera "FRANCINE"?

-Ho, ne, rigardu, tio estas bonege.

-Ĉu vi ne kredas ke ĝi iom provokus?

-Provokanta al kiu, tie ĉi estas telefona deĵoro, la telefonantoj povas vidi nenion transtelefonen.

Ŝi foriris kun stranga sinteno.

Mi ne tro surprizis, kiam tre rapide mi ricevis estraran delegacion kiu alvenis pompege, en mian oficlokon, delegacio de estraranoj.

La prezidanto kun sia sekretariino alvenis. Mi ne povis kredi ke miaj rulŝugliloj perdigus tempon, ordinaro tiel altvaloran .

Mi tamen vidas timeman rideton malantaŭ iliaj grizaj mienoj, eĉ deziron ridegi. Eble la prezidanto gratulos min pro mia genia trovaĵo, kiu permesas gajni tempon?

-Kiom jara vi estas, Sinjorino BOHY?

-Kvardek kvin jaroj ek de unu semajno, Sinjoro Prezidanto.

-Mi ordonas al vi, tuj demetu viajn rulglitilojn! Kio povus pensi la telefonantoj?

-Sed Sinjoro Prezidanto, transtelefonecon neniu povas vidi, ke mi iras per rulŝugliloj, despli tiel mi plej rapide iras por malkroĉi telefonon kaj tiel mi estas pli efika.

-Formetu tuj tiujn rulŝugliloj, ESTAS ORDONO!

-Bone Sinjoro Prezidanto.

Mi deziris saluti lin soldate frapante miajn rulŝugliloj unu kontraŭ la alia.

Je la vespero, mi rehejmiĝis malgaje, Malkuragita kun miaj rulŝugliloj, tute belaj, tute novaj, tute silentaj, miaj belaj luksaj rulŝugliloj. Mi tenas la skatolon sub mia brako. Mi sentas naŭzan kolereton.

Ĉe la fundamenta senteco!

La infanoj ludas en la strato same kiel kutime. Ili ne priatentas al la veturiloj. Mi rigardas ilin malatenteme.

Dekjara knabo estas en kanaletu. Kuŝita ventre sur tabulo mallarĝa kun radetoj. La tabulo subite pensigas min pri miaj belegaj rulŝugliloj ke mi portas sub mia brako.

Mi iam vidis tiun infanon, sed mi ne konas lin. Lia fajna vizaĝo, lia akra rigardo reflektas scivoleman intelekton. Alia knabo atendas lin iom for sur la strato.

-Malek.... hoj. Hoj. Nun estas mia vico, rapidu.

-Ha, jes, mi alve....nassss.

Kiam Malek alvenas ĉe mia proksimeco, mi vokas lin. Li tuj haltas, kvazaŭ li kulpis pri io ajn.

Li restaras kaj rigardas min rekte en la okulojn. Ĉio en lia sinteno aspektas defendemon. Mi sentas agresivan protektemon laŭ la maniero per kiu li rigardis min.

-Kio okazas, Sinjorino?

-Mi vidas ke ci havas rulilojn.

-Jes Sinjorino, estas malnova, oni trovis ilin, kaj dank al ili ni ludas. Ni faras nenion malbonan.

-Kiu estas la infano tie?

Estas Karim mia frato, Sinjorino.

Mi malsentas min. Malkuragita mi sentas min.

Mi proponas al ci interŝanĝon.

-Ci donas al mi ciajn rulsketilojn kaj ci prenas tiun ĉi skatolon.

Ĉe la alia flanko de la strato, la voĉo de Karim krias forte.

-Hoj. Tiam. Malek ci alvenu.....

-Jes.... jes ..... Mi alvenas.

Malek sin turnas al mi antaŭ foriri.

-Dankon Sinjorino.

Ek de tiu tago Malek estiĝis kvazaŭ mia filo.

Kiam mi vidas tiun infanon, falitan de la ĉielo en la strato kie mi loĝas, glittruli sur siaj rulŝugliloj, per sia korpo kaj gamboj, mi piruetas laŭ ne kredebla maniero.

---

Paĝo 5  
HIŜAM.

Tiun tagon, je la fino de la posttamezo, infano sole promenadas sur la trotuarbordo; mi neniam rimarkis lin trapasante tiel. Ŝajnte nenion voli. Li lertece iras sed li rigardas siajn piedojn!

Estas la unua fojo ke mi vidas tiun infanon en mia strato, marŝi malrapide rigardante teren. Despli la infanoj de mia strato neniam sole promenadas. Ili kuras, saltas. Kelkfoje ili sin batas kaj ridas laŭ ĉiuj sentoj. Tiu ĉi infano, sola, marŝas malrapide, rigardas teren.....

Al ĉiuj direktoj li aliras. Tiu ĉi infano, sole, marŝas malrapide, rigardas teren.....  
Tio demandigis min!

-Bonan tagon, ĉu ci apartenas al la familio Butari, la familio ĉe la vidalvida domo?

-J....es.....

-Kiel ci nomas?

-HIŜAM.

-Ĉu ci venis post cia fratino Amina, ĉu?

-J....es....

Li havas haŭton atendente la sunon, li havas nigrajn bukajn hararojn, kies reflektoj ŝanĝas kiam vetero grizas. Liaj malhelaj okuloj ĉiam vekataj. Li belas kaj sentas esperon.

Mi tuj simpatiis spontanece al tiu HIŜAM. Eble ĉar li malsimilas al aliaj infanoj. Mi ne povas diri.

-Sed kion vi havas super la okulo? Montru al mi!

Supre lia maldelstra brovo, estas eta infektaĵo, apenaŭ videbla pro liaj bukaj hararoj kies hartufetoj kaŝas ĝin, falante sur lian frunton.

-Ĉu ĝi doloras Hiŝam?

-Ha, ne.

Mia filo lernanta kuracadon, vizitis min postagmeze. Kutime ni havas multajn por diri sen vere konscii pri tio, mi alparolis lin pri Hiŝam, fakte pri la infekto sur lia frunto super la okulo.

-Ho, Ne, panjo, ci ne demandos al mi ke mi kuracus la infanojn de cia kvartalo.

Ho ne, mi volus simple ke ci rigardu rapide tiun vundon.

Nur tio!

Mi bone vidas ke tio nervozigas mian filon kaj ke li ne deziras.

Li venas nur por viziti min, por esti kun mi, por min renkonti, por paroli pri siaj lernadoj, pri sia ama sento, pri sia loĝejo kaj mi aŭdas lin pripensante al HIŜAM. Apenaŭ se mi preparis manĝaĵon!

Mia filo ne plu interesas min. La infektita vundo de HIŜAM sin enmetas inter ni du.

La infanoj de la kvartalo prenis la tutan spacon en mia kapo.

Elirante la domon, mia filo apenaŭ adiaŭis min. Mi rigardas tra la fenestro diskrete, li trairas la straton kaj sin direktas al la infano sidanta sur la trotuarbordo.

Mi vidas ke ili interparolas.

Poste retrairas la straton, revenas al mi, iomete agacita kaj diris.

-Jen panjo ci devas purigi la vundon, malinfektigi ĝin kaj dank' al pinĉilo ci devas depreni ĉiujn harojn kiuj sidas en la vundo.

Silente li foriras!

Mi surprizas kaj ne scias kion pensi.

Mi vokas Hiŝam kaj li lasas min fari.

La pordo de la vidalvida domo estas iomete malfermita; SALMA, la panjo, salutas min kaj dankas

min. Preskaŭ per ne videbla signo kiu iomete ĝojigas min.

## Iu sabato.

Mi ankoraŭ dormas, mi trapasis parton de la nokto ĉe stranga trinkejo "Gaspi", kie oni povas manĝeti post kunveno aŭ kina vespero. Tie estas iu por paroli. Ĉiam iu por aŭskulti. Kelkfoje mi tie trovas amanton.

Tiu estas genia loko. Mi ŝatas tie refari la mondon! Ruĝa vino agrablas pro mildeco, ravas en la korpo kiu beligas kaj malpezigas min. Feliĉaj ortrezoroj turnigas la kapon kaj redonas plejbelan vivon. Mi revenis sed ne scias kiel, tute ebrieta, hejme.

La sonorilo sonas. Estas sabato, mi atendas nenion. Prudente mi malfermas la pordon malrapide, la infano saĝe atendas sur la trotuaro. Pro mia antaŭa surpriza sinteno, li mem diras, laŭ plej firma sinteno, preskaŭ profesie.

-Sinjorino ĉu vi memoras min, mi estas Malek.

Mi memoris la rulŝuglilojn.

-Mi loĝas la vidalvidan domon, mia fratino havas problemon pro la franca lingvo kaj panjo demandas ĉu vi akceptus helpi ŝin.

Kompreneble tiu infano kaptis min surprize, neatendite, mi ankoraŭ estas en la alkoholaj nuboj.

-Ho, mi ne estas instruistino, sed cia fratino povas veni tiu ĉi vespero, mi vidos kun ŝi kiel mi povus helpi ŝin.

-Ne, mia panjo diras ke vi devos veni hejmen.

La forta sinteno de tiu dek jara infano cedigis min kaj mi respondas iomete rapide laŭ parolmaniero iomete enervita meze ĝentila:

-Bone konsentite; mi venos tiun ĉi posttagmezon je la dek sepa.

Je dek sesa kaj kvardek kvin minutoj, mi purigis miajn dentojn por forviŝi la alkoolan odoron dank al dentopasto kaj forigas la odoron.

Mi trairas la straton, mi sonigas.

Mi eniras la vidalvidan domon por la unua fojo.

Tuj mi retrovas min ĉe ne konata grundo kaj sinsekvas strangaj parfumoj de alia mondo.

La infano MALEK enirigas min en belegan ĉambron de la teretaĝo kaj invitas min sidiĝi kaj foriras piedfingre.

Mi atendas momenton, sed kion mi faras ĉi tie? Mi sentas min solan. Mi rigardas ĉien. La ĉambro pensigas al la suno; laŭ la longeco de la muroj, seĝoj rekovritaj de orkoloraj tukoj. Tiu donas agrablan etoson.

SALMA la patrino, eniras la unua, mi neniam vidis ŝin tiel proksime. Ŝi estas vestita laŭ orienta modo kvazaŭ en la filmoj kaj siaj formoj bele rondas.

Mi min levas, mi ne scias kiel saluti ŝin, Ŝi ridetas al mi, ŝiaj okuloj brilas pro ĝentileco. Ŝi metas antaŭ mi teon kaj pladon kun kukoj, kaj per signo, ŝi komprenigas, ke mi restu sidanta. Ŝi malmulte

parolas sed malbone la francan.

NAIMA eniras, kun bebo sur siaj brakoj, kiun ŝi donas al sia panjo. Tre simpatia knabino, de verŝajne dek du jaroj, kisas min kvazaŭ ni estus parencoj kiuj konus nin de longe. Ni komencas reviziti la kursojn.

La panjo sidas antaŭ ni, la bebo sur la genuoj. Ŝi rigardas min scivoleme. Mi provas trovi simpatiajn formojn por ke NAIMA akiru facile iajn gramatikajn regulojn. Tuj ridetis ŝin kaj kelfoje ŝi vere ridas. Ŝia demandema panjo demandas la kialon kaj petas tradukon. Tiu sinteno ĝenas kaj nervozigas min. Mi dezirus diri al ŝi, foriru de tiu ĉi ĉambro!

NAIMA estas inteligenta, viva spirito, ŝiaj scivolemaj okuloj kaj ludemaj sintenoj iom post iom min formemorigos pri la ĉeesto de la panjo kaj de la bebo.

Eksterordinareco ligigis nin.

Ŝi bonodoras kaj ofertas al mi sian spontanegan fidon.

Mi pretas foriri la domon, kontenta pri mi, subite NAIMA moviĝas kaj rigardas sian panjon kun angora rigardo.

La imano estas tie: NAIMA demandas, kion ŝi devus fari pro lia ĉeesto. Mi ne komprenas la respondon de SALMA la panjo. Sed mi aŭdas en ŝia voĉo ordoneman kvietigon kaj trankviligon. Mi rigardas NAIMAn per demandema sinteno.

-Mia panjo diras ke estas neniu problemo, ci ne estas mulzumanino, sed ci estas amikino kaj bonvenita en nia domo.

Fakte la Imano salutas de for, diras kelkajn vortojn al NAIMA kaj daŭrigas sian vojon.

Mi konfesas ke mi iomete perdiĝis, mi sentis min kvazaŭ mi estus en filmo.

Kio estas la Muzulmana religio?

Kiuj estas Muzulmanoj?

Kiu mi estas por ili?

Ili estas Muzulmanoj.

Mi ne estas Muzulmana.

Mi estas amikino.

Mi foriras la domon, trairas la straton kaj faldiĝas min en mia domo, mi kuŝas sub kovrilo, mi fidus en la vivo.

## Malbona lernanto.

-FRANCINE mia panjo vokas vin.

-Tuj rekte tiel diris HIŜAM?

-j.....es.

La infano HIŜAM parolanta per dubemeca voĉo, mi sentas senpridiskutan urĝon.

Mi trairas tuj la straton kaj eniras la vidalvidan domon; SALMA, la panjo, atendas min kun sulkoj sur la frunto; tuj ŝi donas leteron. Mi suspektas ke la plej aĝaj infanoj tralegis ĝin kaj ili sentis malbonan etoson.

-----  
Sankta JOZEF instituto Dato.....  
unuaj klasoj da lernado al la parencoj de .....

Gesinjoroj

Via infano HIŜAM havas problemojn en la lerneja klaso. Ni dezirus paroli pri tio kun vi, por elekti la plej advekvatan solvon.

Ĉu vi povus prezenti vin en la direktoran oficejon tiun ĉi jaŭdon je la 14a horo.

Ricevu, gesinjoroj, niajn plej distingitajn salutojn.

-----  
La panjo rigardas min maltrankvile.

-Kio okazas FRANCINE?

-Mi ne tro scias SALMA, la lernejdirektoro deziras vidi vin JUSEF-n la patron kaj vin SALMA-n por paroli, temos pri HIŜAM.

Ŝi agreseme alparolis al sia filo.

-HIŜAM kion vi faris, ĉi alportas problemojn, Ĉu?

La infano subite ŝajnas malgrandiĝi.

-Mi ..... ne ....sci...as panjo, mi nenian malbonon faris.

La panjo daŭrigas per minaca vizaĝo. Mi komprenas nenion. Sed mi komprenas ke ŝi estas malkontenta pri la knabo pro la letero kaj la voĉo pli fortiĝas.

La rigardo de la gefratoj estas turnita al HIŜAM kaj li ne scias kion fari.

-Aŭskultu SALMA la plej taŭga decido, iru kun JUSEF al la direktoro.

-JUSEF ne venos, li ne ŝatas, ĉi venu kun mi FRANCINE.

La kapo de la direktoro kiam mi kaj SALMA eniris!

Li rigardas ŝin, levas la brovojn, rigardas min.....



kaj per signo invitas nin sidiĝi.

## Paĝo 9

SALMA belegas pli ol kutime, sur sia kapo larĝa rubando tiel kapkovrilo kvazaŭ kalabaso, kiu akcentas la okulnan vivecon. Ŝia ŝvelpantalono brilas, ŝi aspektas princino de mil kaj unu noktoj, spica paĉulaodoro eliras de ŝi.

La direktoro digne tusetas kaj komencas:

-Bone. Ni venu al la celo! Jen: HIŜAM estas for de la nivelo en la tria elementa klaso, post la venonta jaro post la finaj jarfestoj, li ne kapablos kaj tial li reiros ĉe la dua klaso kaj ni devos eble antaŭvidi specialan lernadon.

Li silentas, SALMA komprenis nenion, la direktoro ne deziras diri pli kaj eĉ deziras ke ni foriru rapide. SALMA interesita panjo, turnas sin al mi.

-Kio FRANCINE, kion diras la sinjoro, kion faris HIŜAM?

Mi ne respondas al ŝi, sed alparolas la direktoron.

-Sinjoro direktoro: mi devas diri ke mi miras: tiu infano ne estas malinteligenta, ŝajnas al mi ke li estas tre inteligenta, scivolema, kun vivema spirito.

-Aŭskultu sinjorino, estas tamen tio kiu rezultas pro sia sinteno.

Li daŭrigas kun subjekta sinteno. Preskaŭ malestima pri mi.

-Sed kiu vi estas, sinjorino, kial vi interesiĝas pri tiu infano.

-Mi estas socia asistantino de la komunumo. Kaj aliflanke sufiĉe proksima al tiu familio.

Mi profitas lian miron por aldoni firman konvinkitecon.

-Sinjoro direktoro, mi proponas al vi.

La direktoro rigardas min malpacience.

-Mi aŭskultas sinjorino socia asistantino.

-Mi proponas ke HIŜAM restu en la tria klaso dum la unua periodo. Mi sekvos lin post la lernejo kaj provos remeti lin je la nivelo. Mi konas la infanon, mi scias ke li ne estas stulta, kontraŭe li estas tre inteligenta.

-Ni vidos tion, kion tio donos, sinjorino socia asistantino. Sed mi kredas ke vi perdos vian tempon.

Elirante, la panjo demandis min.

Mi pacigas ŝin.

Mi rediras al ŝi, kion mi proponis al la direktoro.

Ŝia filo estas bele edukita.

Ŝia filo estas ĝentila, ĉiam pura kaj bele vestita.

Simple kelkfoje li forgesas lernadi siajn lecionojn ĉar li estas tre inteligenta. La direktoro devus tion diri al la gepatroj.

-Tio estas la tuto, SALMA! Ci vidas la aferon, tio ne gravegas.

Ŝi rigardas min per siaj brilantaj kaj ridemaj belaj okuloj:

-Kion fari FRANCINE?

-Ho: li venos post la lernejo, mi povos vidi ĉu estas io forgesita. Ĉu konsentite SALMA?

Trairante la korton kie la infanoj sin rekreas, iu knabo alvenis kurante kaj demandis:

-Sinjorino ĉu vere vi estas la onklino de HIŜAM?

Sen pripensi mi lin respondis kun firmeco, ha se HIŜAM diris tion, tiam estas la vero!

Nun mi estas onklino, de MAGREBA infano plie muzulmana.

Tiel oni ĉion vidis! Mi kiu kontraŭas la religiojn, la familiojn, la interkonsentojn, la societeton.

Sed kio okazis al mi?

Mi kiu malamas ligilojn, mi ligis min sen antaŭdeziro, sen distanco, sen pripensado, sen majstreco.

Kun la destino de infanplena familio.

## Lerneja vojaĝo.

Mia domo ne havas sonbutonon, sed ŝnuro por sonorigi la sonorilon. La sono estas beleta kaj kiam mi ĝin aŭdas alvenas al mi, la deziro malfermi la pordon kun bonhumoro. En mi dancetas ĉio ĝoje, mi evidente haltas tiun sintenon, kiam mi malfermas pordon. Tiun ĉi fojon la sonorilo sonas timege, preskaŭ ne aŭdebla sed insisteme. Mi rapide iras kaj malfermas scivoleme.

NAIMA eniras kaj tuj saltas en miajn brakojn, mi fermas la pordon per piedpuŝo. Larmoj akvumas ŝiajn okulojn kaj mian kolon. Ŝiaj ĉarmegaj ploroj enigis mian bruston. Ŝiaj paroloj ne aŭdeblas, ŝia angoro falas sur mian estaĵon. Jes mi estas en alia malfacilaĵo, la malgajeco de tiu dek du jara knabino falas sur mian tutan korpon. Mi ne scias kion fari. Sed fundamente, en mi mem, mi malŝatas tiun ĉi fekaĵan vivon. Mi estimas maljuste, senti la malesperon tiel junan kiu skuas min de ĉie. Mi ne permesas min movi, NAIMA karcerigas min per ŝia doloro kaj pro ŝia malĝojo.

Subite ŝi retiras sin kaj sen spiri, laŭ la rapido de karesela rusmontglitejo, rapidege, ŝi lancas: Mia patro ne permesas ke mi partoprenu al la lerneja vojaĝo.

Ŝi denove rekomencas plori pli kaj pli. Ŝi remetas sin en la varmecon de miajn brakojn. Mi kvietigas ŝin kaj malakvigas ŝian vizaĝon kaj okulojn kaj flustras mildajn vortojn, plenajn da esperoj.

-Trankviligu, mia etulino, mi alporalos al ciaj gepatroj.

Ŝiaj ploroj rekomencas pli forte, preskaŭ kriegante.

-Neniam ili volos, ili timas.

-Timas pro kio NAIMA?

-Timas pri mia virgineco.

-Restarigu vian sintenon, mi tamen provos.

NAIMA parte kvietis sed post momento, kolero ĉe miaj fundamentoj grumblas ĉe miaj intestoj. Mi trairas la straton, eniras la vidalvidan domon.

Infano sur la ŝtuparo krias.

-Panjo estas FRANCINE.

Mi ŝatas JUSEF li nomas min FRANCIS kvazaŭ mi estus meze viro meze virino.

Ek de la malsupreniro meze de la ŝtuparo mi aŭdas la firmitan voĉon de JUSEF.

-FRANCIS estas NE!

Mirigita, mi aŭdas min trompete laŭ akcento kion mi volis neŭtra.

-Kion NE! JUSEF!

-NE! NAIMA ne iros per lerneja vojaĝo.

Mi malsupreniras la ŝtuparon, mia koro batas kaj mi tremadas iomete. La gefratoj de NAIMA rigardas min senmove kun angoro, SALMA rapide foriras diskrete.

La NE estas rapida kaj premigita.

Mi hezitas, kion fari?

Mi reprenas min kaj prizorgas nenion.

Mi staras antaŭ JUSEF.

-Ci tamen devas scii JUSEF ke la lerneja vojaĝo valoras same kiel ĉeesto en la lernejo! Tio estas devigo! Tio apartenas al la lerneja instruado. Se ŝi ne povas, vi devos doni kuracistan atestaĵon.

JUSEF rigardas min dirante nenion.

-Ci decidis JUSEF. Ci estas la estro.

Mi foriras same tiel mi alvenis, eble kun pli da firmeco.

Ha mi ne moralizis lin pri la monsubteno kiu povus esti nuligita se la infano ne partoprenas al la lernejaj aktivaĵoj.

BONA DIECO..... PRI KIO mi prizorgas! SED PRI KIO MI PRIZORGAS!

Je la mateno mi ekvidis NAIMAn irante al la lernejo, ŝi iradias pro beleco sub griza ĉielo, rigardas min, ridetas levante la dikan fingron al la alton por signifi la vinkon. Mi iras al ŝi kaj diras flustre murmuron.

-Pri atentu ..... VIRGINECO!

Ŝi ridegas ĝoje kaj tio resonas en la silento. Jes! Kiom mi amas NAIMAn!

Ĉe la spicejo, mi renkontras JUSEF, li estas nur kun viroj en la dometo. Ĉiuj portas longan puran blankan robon. Ili rigardas min.

JUSEF diras al mi bonhumore.

-Bonan tagon FRANCIS.

Mi dezirus salti al sia kolo kaj danki por NAIMA.

-Bonan tagon JUSEF kaj daŭre sed flustre, mi diras: ci estas genia kaj bonega paĉjo.

Li respondas per kliniĝo de okuloj, kaŝite al rigardo de la aliaj viroj.

Tiu fekaĉa vivo, mirinde. Kiel ĝi povas kelkfoje esti genia! En la strato mi deziras kanti dancante kaj mi dankas la vivon pro la potenca humileco de JUSEF.

## La mono.

Ŝajnas ke mi aŭdis sonorilon timeme soni, preskaŭ ne aŭdeble. Jes, mi kredis aŭdi malfortan vibradon venitan de for.

Por konvenki min, mi iras al la pordo. Mi malfemas ĝin. Rapide, diskrete mi trarigardas la straton por ne esti rigardata tiel se mi estus stulta, ĉu estus neniu!

Mia trarigardo aperigas infaneton kvar aŭ kvin jaraĝan apud mia enirejo, li rigardas min intense. -Kion ci faras tie?

Laŭ sia miena sinteno, laŭ sia maniero rigardi min, danke al la vizaĝa formo, mi rekonas infanon de la vidalvida domo. Lia malforta voĉo.

Li demandas;

-Panjo, petas du cent eŭrojn por fini la monaton.

-Kio!

Instinktive mi alrigardas la vidalvidan domon, mi ne kredas miajn orelojn, mi pensas pri ŝerco. Mi vidas la panjon antaŭ sia domo, ŝi rigardas al mi.

Peti monon de mi!

Ĉiu monato mi devas kalkuli por pagi miajn ŝuldojn, mi nur havas mian salajron, mi devas pagi la lernejan kurson ĉe la universitato, kie mia filo lernas kuracadon, mi ŝuldas mian domon kaj ankaŭ la veturilon, k.t.p.

Mi diras min, ke mi ne kapablas!

La etulo ekkomprenas mian hezitudon. Li aldonas per sia infana voĉo same se li per kore lernis: Estas por la RAMADANO FRANCINE. Ek de kiam alvenos la subtenantan monon, panjo redonos al vi. Diru nenion al mia paĉjo.

Pro tiu aldono: "diru nenion al la viro", mi aŭdas demandon de virino al virino. Kaj tiu sento suprenigas min. Tiu mondemando, kortuŝegas min, maltrankviligas kaj antaŭiras min.

Mi ne havas monon ĉi tie, sed mi iros ĉe la banko, mi revenos ĉi vespere.

*"sed FRANCINE, ci tute malsanas. Oni diris al ci ke ili demandas monon. Ha, mia karulino se ci kredas ke vi revidos la koloron de vian monon.... Tie ci metas, cian fingron en cian okulon. Kaj plie sendi etulon por peti, tio malbelegas."*

Mi diras min, miaj kunuloj ne simpatias rememorigi al mi antaŭjuĝojn kiuj trairas pri la loĝantoj de mia kvartalo. Mi dubas kaj demandas min, ĉu ili pravas!

Mi iras ĉe la banko kaj deprenas ducent eŭrojn.

Miaj laboraj kolegoj nutris mian timemon. Ĉu mi revidos mian monon? Mi ne povas permesi al mi donaci. Mi mem tro bezonas.

Ekde tiu momento, mi rememoras la multajn fojojn, kiam mi petis materian helpon por mia infano. Kaj ofte mi ne redonis!

Vespere, la sama etulo venas preni la monon, mi miras ĉar la plej aĝaj revenis el la lernejo.

Li estas tiel eta etulo, sed liaj okuloj inteligente brilas kun graveco. Li prenas monon, trairas kurante la straton kaj fermas la pordon de la vidalvida domo.

La panjo staras malaŭtaŭ pardon? Ĉu li bone donos monon?

Mi travivas timon kaj malkvietecon pro ago kaŝita de la famiestro.

## Estas preskaŭ meznokto.

La strata sonorilo sonoras dum la nokta silento. Enlitigita, mi faris kvazaŭ mi ne aŭdis kaj envolviĝis en miaj kovriloj sub la kuseno.

Denove la sonorilo sonas fortege.

Tria sonorigado sonoras, ŝiras la kvietecon de la dormanta strato.

Tiu ĉi foje estas tro; mi min levas furioze. Mi noktevojaĝis en la reva modo. Mi ellitiĝas, malsupreniras, malfermas pardon malkontentan, pretan al leonblekoj. Kiu permesas al si elirigi min el mia lito dum tiama horo? Se estus mia amanto de ĉe GASPI, mi rompos lian buŝegon. La infano MALEK atendas min sur la trotuaro, mia voĉo volas esti firma kaj grava.

-Sed finfine MALEK kio okazas tiel malfrue?

-pardonu FRANCINE, mi havas problemon!

-Ha! eniru.

Lia visaĝo same kandela flamo kiu lumigus iomete la straton, li enŝoviĝas en la domon.

-Jen, la matemetika profesoro, FRANCINE, severas kaj por morgaŭ mi devos havi cirkelon.

Mi profunde enspiras, preta resendi la infanon kiu vekigis min pro cirkelo.

Je mia granda miro mi respondas kun akceptema rideto!

-Kaj por la profesoro pri franca lingvo mi devas legi libron de " DANY ĈAMPIONO DE LA MONDO de ...."mi alportis la libron por montri al vi.

Cirkelo, libro.... kaj tio dum nokto!

-Ve! ve! MALEK!

-Mi devas ankoraŭ skribi tekston pri familio.

-Ĉu vi povas helpi min FRANCINE.

Unue: la cirkelo ..... post serĉado mi trovis.

Due: legado de libro, mi ŝategas, ni legas, unu post la alia ĉapitro, estas genia, ci vidos etulon!

-Trie: tiu ĉi nokto ci pensos al ĉio kion la vorto familio pensigas cin (kio belas, kio ĝenas) kaj morgaŭ kun mi, ni vidos kiel skribi ĉion.

-Konsentite FRANCINE.

Estas meznokto, MALEK iradias kaj mi sentas la varmecon de la por ligna hejtaĵo kiu eniras mian tutecon. Estas meznokto.

Mi reiras en mian liton.

Mi reenvolviĝas en miaj kovriloj, fermas la okulojn kaj transportas min en la revan universon; la infano MALEK kun farbilo en la mano refarbas mian ĉielon per bluaj koloroj.

## Estas la "ramadano"

La kvartalo febras. Enestas movado, bruojn, senfina reirado de domo al domon. La voĉoj resonas tra la strato same univerala muziko. Enestas ridetoj, salutoj, koraj rilatoj. La angula spicejo de MOHAMED estas ĉiam plena da belaj kaj bongustaj kuketoj de ĉiaj specoj.

Vespere la etulino AMINA alportas al mi varman kaserolon da supo, kiun ŝi prudente portas kaj timas verŝi. Mi surpriziĝas.

-Panjo sendas al vi supon, FRANCINE. Tio estas la supo de "RAMADANO".

Kiam AMINA diras "RAMADANO" multkoloraj steleretoj eliras ŝiajn grandegajn okulojn .

Tuj AMINA foririte, mi aliras la supon "RAMADANO" kaj manĝegas ĝin kun feliĉo. Mi malkovras nekonatan guston . Mildaj spicoj, odorantaj kiuj freŝigas la palatan ravon. Mi pligrandegas tiun gustan feliĉon dank', al glaso da ruĝa vino.

Ĉiu vespero mi ricevas tiun bonegan supon. Kaj ĉiu vespero estas alia infano kiu kunportas. Kelkfoje ili estas du kaj steleroj brilas en iliaj okuloj. Mi preskaŭ forgesas la pruntedonitan monon!

Foje mi pripensas al la dirintaĵoj de mia koleginino KLARA: Kiam mi prutedonas monon, mi konsideras ke ĝi estas donita!

Kaj mi en la kora fundamento, mi kulpas ne pensi tiel. La sumo pruntedonita necesas ke oni redonu ĝin al mi ĉar mi bezonas ĝin por pagi fakturojn.

La RAMADANAĴ tagoj ĝentile trapasas, ĝojaj kaj kunvivantaj. Kaj mi feliĉe ŝvebas en tiun kvartalon subite optimistan.

Mi konas la momenton kiam familioj ricevas monsubtenan familian ĉekon kaj, sen montri min, mi observas la movojn ĉe la vidalvida domo.

Mi atendas kun espero. Mi konfesas.

Mi meditas saĝan pripensadon kaj pri la realeco de la amikoj, al kiuj mi tuj bedaŭris mian konfeson Pri la prunedono!

Idiotino,  
Naivulino,  
Senkonsciulino,  
Simplulino,

kelkaj sonoriloj sonoras mallerte vibrigantaj mian pardonon, mi tuj rekonas la manieron de la knabeto. Li donas ion malerte el sia maneto, silente. En mian manon li metas du biletojn da cent euroj.

-Pajno dankas.

La etulo tuj forkuras.

Mi konfesas ke mi hontas pri mi . Mi hontas pro dubo. Hontas pro mia ligo al la antaŭjuĝo de la bonpensantoj.

La panjo staras ĉe angulo antaŭ sia pordo. Kaj de la mano diskrete ŝi dankas min kun dankaj kaj atestanta rideto.

Tuj la pordo fermita, mi ĝoje saltas.

Mi ne estas.....

Nek idiota  
Nek naiva  
Neksenkonscia  
Nek simplulino

Mi dubas, mi ne certas, mi timas, bone....  
Mi estas...  
Tute normala homa  
Mi belege rekunligiĝas kun la vivo

Laŭ malpezaj dancaj paŝoj, mi kantas kaj dankas ĉielon, teron, la kvartalon, SALMAN, la etulan mesaĝiston kaj eĉ la RAMADANON.

Kaj grimaco pligrandigita laŭ vole, kiun mi ŝvebe sendas al ĉiuj kiuj nomis min idiotan, memvolan stutulinon.

## La ferioj ĉe JOJO onklino.

En mia kvartalo, la suna maroka etoso ŝvebas kun sentoj da espero. Estas granda libertempo kaj la ŝarĝaŭtomobiloj "spacaj aŭtoj", tute belaj brilas jam pro ĝojo retrovoj kun la familianoj lasitaj en la "BLED" lando de la origino, la ŝarĝo sur la supro de aŭto plenigas ĝin.

Mi sidas sur mia trotuaro antaŭ mia domo, mi observas kun surprizo tion, kio okazas en mia strato. -la reiro al la lando kantas komprenon de la mistero. Ek de la momento kiam familio pretas foriri, la "ju, ju, ju" de la virinoj gaje leviĝas al la ĉielo kvazaŭ himno al la vivo. Tio estas tiel bela ke miaj okuloj ne sufiĉas kaj pikikĝas. Mi sentas min en ĉiaj miaj statoj skuita, removigita, mirigita, nervoza. Mi malpeziĝas kaj estas altirita per la senpacienca deziro foriri. Mi ankaŭ sentas la alvokon al la suno, al tiuj marokaj nutraĵoj (KUSKUSO kaj TAĴINO), iom post iom la strato malpleniĝas.

La infanoj de la vidalvida domo tiu ĉi ĵaro ne foriros ĉe la lando de kie venis iliaj gepatroj. Ek de la mateno la infanoj iradas sen celo, ilia animo malagrablus, en la silenta strato. NAIMA daŭrigas la domlaborojn kaj intertempe ŝi restas ĉe la fenestro, revante.

Mi ankaŭ revas, mi repensas al la belegaj ferioj kiun ni trapasis en plena arbaro. Anguleto perdita en ARDENOJ "belga regiono", mia fratino posedas ion, hazarde tiu loko sidas meze de arbaro, trairita per tute eta rivereto. Tiu memoraĵo senvole revenis en mian memoron.

Dia ideo, naiva kaj plenplenigite ne pripensata, miaj blondaj haroj de tiu epoko rememorigis min. Mi imagas mian fratinton kun mi akceptante la infanojn de la vidalvida domo por travivi feriojn en arbaro.

Fakte mia fratinetino, kiu loĝas en la valonia Brabanto neniam vidis Marokajn infanojn laŭ la karno kaj ostoj:: tuj ŝi akceptas sen iu ajn demando, sia entuziasmo sen neniŭ antaŭa pripensado ŝarmas min. Laŭ ŝia rigardo, laŭ ŝia viva maniero, ĉio facilas kaj belas.

Ĉu JUSEF kaj SALMA, la gepatroj, lasos la respondecon de iliaj infanoj por kelkaj libertempaj tagoj en la sudo de Belgio.  
Belege.

Onklino ĴOĴO alvenas en mian kvartalon per aŭtomobilo malnova.

Tiel rondita kiel ŝi ridas ĉe ĉiaj flankoj, ŝi ĉarmas ĉiujn! Kisas familianojn kun amo kvazaŭ festo ĉe ni.

Mi tute forgesis diri al ŝi, ke tiu familio estas muzulmana kaj ke estas malpermesata al virino kisi viron. Mia angoro rapide foriris dank' al JUSEF, kiu redonas kison al mia fratineteto, nature per bonhumoro. "Feliĉe"! (mirinde).

La infanoj eniris en la du veturilojn, ni pretas foriri al ARDENOJ, Ni ĉiuj ekcetitaj eĉ mem revemaj.

Sed kie estas NAIMA?

Mi ne rimarkis ke NAIMA ne estis kun ni, ŝi mankas al la vokado. Mi miras pro ŝia neĉeesto, mi bezonas ŝian bonhumoron, ŝian viglon, ŝian gracian gajecon kaj ĉefe ŝian helpemon.  
Mi kuras rapide en la vidalvidan domon. Mi malsupreniras la ŝtuparojn kiuj gvidas al la komuna ĉambro. Mi senpacience demandas kie estas NAIMA?

-NAIMA rapidu oni atendas cin!

NAIMA straras en angulo.

-Miaj gepatroj rifuzas ke mi akompanos.

-KIO!

Ankoraŭ tiu historio pri virgineco.

Tuj, subite mi ruĝe vidas, la fulmo falas sur mian kapon, mi ĉion rompos, metos bombon kaj ĉion eksplodigos.

JUSEF kaj SALMA rigardas min kaj la patro surprizita pro mia intensego, pro mia reago klarigas al mi ĝentile.

-Ni timas pri NAIMA, ĉu ci komprenas FRANCIS? La virgineco estas grava por ni.

Le kolero kaptas ĉion en mia korpo, mi koleriĝas en la ventro, mi fulmotondras.

Mi fermas la okulojn nur sekundon kaj el la silento de mia spirito, mi preĝas la superulojn kiuj regas la mondon por ke ili donu justecon.

Mi kvietigas min, sed la kolero enestas ankoraŭ, ĝi grumblas en la fundamento de mi mem kaj subite mi eksplodas.

-Auskultu JUSEF, onklino ĴOĴO estas ino, mi estas ino, LEIKA la hundino estas ino, ŝi estas granda kzazaŭ bovino, ŝiajn dentojn tranĉas kiel al cia razilo kaj mi asertas al ci ke se iu ulo alproksimiĝus de NAIMA, LEIKA ŝirus lin en mil pecoj.

JUSEF kaj SALMA ne plu scias kion diri pro miaj reagoj.

Ili diras nenion.

Ili sin rigardas.

NAIMA haltas plori, scivolante pri la reago de siaj gepatroj.

Mi, ankoraŭ sen blovo, ne kapablas spiri pro tiuj vanaj koleroj.

Subite, timega necerteco.

Dum duono da sekunda spaco, mi strange sentas ke ni kvar estos transportitaj per fulmaj brilantaĵoj.



Klinokulo de JUSEF preskaŭ ne videbla al sia filino. Li ne bezonas paroli, klinokulo kiu sentas toleremon kaj amon. NAIMA komprenis.

Onklino ĴOĴO estas jam en la veturilo, NAIMA eniras rapide, timante ke siaj gepatroj ŝanĝu je ideo.

Nia bonhumoro transiras BRUSELON kantante kun grande malfermitaj fenestroj.

Jes, jen, tie ĉi,  
La, la, la, lali,  
La familio buteri,  
La, la, la, lali,  
FRANCINE kaj ĴOĴO,  
La, la, la, lalo,  
Veturante al ARDENO,  
Kun LAIKA hundino,  
Tiele terura gardistino,  
Jes, ja hura!  
La, la, li, lala.

Ni finfine alvenas sur la grundo de la onklino ĴOĴO, la grandaj arboj de tiu arbaro filtras la sunajn radiojn.

ĴOĴO kaj mi dormos en ruldomo kaj la infanoj sub tendoj. La infanoj miras pro nia kontentego. Mi jam pripensas kun ia ĝojo al tiu botelo da PORTO kaj al la glaso kie mia fratino kaj mi trinkos.

La infanoj eliras la aŭtojn kaj malkovras la odorantajn arbojn, la teran akvumecon, ni ĉiuj miras. Fratineto kun mi iros gustumi tiun ĉi vesperon, kiam infanoj dormos, antaŭ la fumo de la ligna fajro tuj sur la tera grundo. Odorigante nin per la vesperaodoro, kun la protektantaj steloj. Ni remalkovros nian feliĉon al la vivo.

Ni ekstaziĝos tute neimageble, la ruĝa vina PORTO por atesti pri nia viva feliĉo.

OMAR la etulo, rigardas ĉien, li miregas, la arboj suprenestas ĉe la ĉielo, li kontentas onklinon ĴOĴO,  
-FRANCINE, venu vidi, mi trovis birdon.  
En la mezo de sia mano, ni malkovras fakte, ravan birdeton kiu pepas kriante, lia pepiado demandas la infanon:  
-Onklino ĴOĴO .... kial birdeto ploras?

Onklino ne scias kion respondi, ŝi rigardas min per grandaj demandemaj okuloj. OMAR sin identiĝis al la birdeta maltrankvileco kaj respondas laŭ taŭga maniero.

Ĉar ĝi timas,

-ĝi estas tute sola, ni remetos ĝin al sia panjo, ĉu FRANCINE?

-Jes OMAR bona ideo.

Onklino ĴOĴO rimarkigas al mi, la vivecon kaj la tujkomprenon en la OMARaj okuloj same al tiu birdeto en lia komenca vivo, kvazaŭ ligilo enestus inter tiu birdeto kaj OMAR.

Ĉefe ŝia filo DAVIDO. Ŝi revidas en la korpo de tiu etulo OMAR, kiu senĉese movasas avide, rigardanta la plej etajn estaĵojn en ĉia loko.

-Ĉu ci vidas FRANCINE: Ĉio mirigas tiel ke li pensigas min al mia filo DAVID.

Mi kontentiĝas pro la eldiro de ĴOĴO, la infaneco de niaj infanoj nun adoltajn, restas en la koroj de ĉiuj infanoj eĉ se ili venas de for el la mondo, eĉ se ili estas muzulmanoj.

Onklino ĴOĴO feliĉas ..... Malantaŭ al la rigardo pri sia filo, stariĝas sama danco al la rigardo al tiu pri OMAR.

KARIM, MALEK kaj la aliaj malkovras rave la rivereton kiu fluas iomete sube: tio estas nia malvarmigilo, ĝi freŝigos niajn nutraĵojn kaj bierojn kiujn ni gustumos freŝajn je la taŭga momento. ĴOĴO kaj mi similas al sovaĝulinoj, kies niaj korpoj disdonas nian ĝojon per gestoj al ĉiuj rekte kaj tio similas dancojn preskaŭ kiel tiuj arboj.

Kiam vento blovas milde, balanciĝas branĉoj. Ni revivas multajn momentojn pri nia juneco. Ni feris ĉi tie kun la infanoj por spiri la protektitan pacon el la civilo. Ni revidas tuj la infanecoj de niaj infanoj kaj ni plenigas nin per memoraĵoj revenantaj al ni kun la feliĉo de la spirito

HISAM prenas belegan ŝtonon en la rivereto, li observas, li aŭkultas ĝin laŭ sia sento kvazaŭ ĝi havus ion por rakonti.

Onklino ĴOĴO iris al la supro de la rivereto, ŝajnante serĉi ion. Subite ŝi ekkriis:

-Tio estas; venu, mi trovis ĝin.

Ni ĉiuj kuras apud ĴOĴO starante iomete pli alte, la du piedoj en la akvo kaj la manoj tute akvumitaj. Ŝia tute lumigita vizaĝo? pensigas al infanoj kiuj estus trovintaj trezoron, enterigitan je la malnova tempo.

-Rigardu, FRANCINE, ĝi ankoraŭ estis kaŝita ĉi tie, tio estas genia.

-Rigardu la infanoj, tio estas la fonto. .... Ĝi estas bona por trinki kaj bongusta..

La infanoj ne kredas siajn okulojn. La pureco de la akvo sin reflektas en iliaj rigardoj. La fonto estas bela kaj bona trezoro, ĝiaj koloroj brilas skiel diamanto kies koloroj kantas kiam ĝi ofertiĝas al ni. Sed nun ni devas fajrigi fajron kaj prepari manĝadon kaj munti tendon.

Vidante la infanojn debati gaje en tiu arbara anguleto en la fundo de ARDENO, mi kaj ĴOĴO, ni nin rigardas kun kontentiĝo ĉe niaj koroj. Grandega ĝojo.

Vespere, sidante laŭ duona rondo ĉirkaŭ la fajro, ni kantas frenezece sub la akceptemaj stelaroj en la ĉielo.

*Ni flamis la rezinajn lignojn; odoroj trairas mian korpon*

*Kaj sekrete mi preĝas superdiecojn.*

*Helpu min, bonvolu, vi ĉiuj supre, ke via flamo falu sur niajn kapojn.*

Mi rakontas historion, same kiel antaŭe kiam mi faris al niaj infanoj. Historio inventita laŭvole por infanoj dank' al iliaj okulaj reagoj: Mia fratineteto tute miras:

-Sed kie ci iras serĉi tiajn historiojn?

-Fakte, estas la infanoj mem, per okulaj movadoj, kiuj gvidas historion kiun mi rakontas kvazaŭ vero!

La tuta nokto ne ankoraŭ alvenis ĉirkaŭ ni, kiam la etuloj eniris en sian dormsakon, pretaj por dormi kaj revii!

Rapide, ĴOĴO kaj mi elprenas la vinan PORTO botelon el ĝia kaŝeto kaj vidalvide la

fajron, ni gustumas, en silenta dialogo, nian feliĉeton naskiĝi laŭ simpleco en tiu ĉi kompleksa malfeliĉa mondo.

Krioj venantaj el la tendo malordigas niajn nubigitajn kapojn.

-Onklino ĴOĴO, FRANCINE, hoj, hoj.

Ni pensis ke la infanoj estis dormantaj, kaj ili vokas nin per timema voĉo. Ili timegas.

Mi min levas, iomete incitegita, iras al la tendo. Firme decidita koleri.

Sed estas jam nigra nokto.

-Estas la horo dormi. DEVIGE!

Kaj mi kriis SILENTU! DORMU!

-FRANCINE, ni timegas, oni aŭdas bruojn. KARIM diras ke estas la arbaraj fantomoj, ni ne scipovas dormi.

Ili sidas sur siaj matracoj, min rigardas per grandaj malfermitaj okuloj.

Ankoraŭ pli belaj ol kutime. Sed granda timego legiĝas en iliaj okuloj.

Mi vokas ĴOĴOn.

-Kion fari ĴOĴO.

ĴOĴO plenplena da saĝeco, monde rekonata:

-Kviete. Kvazaŭ ĉio estus normala.

Ŝi diras:

-Ha, se ili timas, ni ne povas lasi ilin tiel.

-Sed kion fari tiam?

-Eble preferinde translokigi ilin al la ruldomo.

-Ha, ha, tio ne taŭgas, NE! La ruldomo estas por ni, ci ne konscias, ni estos tiel sardinoj en skatolo.

Tio ne eblas ĴOĴO!

Sed la infanoj timegas; tion oni vidas ĉe iliaj okuloj.

Post du aŭ tri movadoj helpitaj per kandeloj kaj potlampoj, ni instalas ilin en la ruldomo, la infanoj kontentas.

Mi ne.

ĴOĴO ridas.

Mi grumblas.

Ek la dormo de infanojn, ĴOĴO kaj mi ĝuas pri iliaj spiraj muzikoj kaj pri la varmeco de iliaj spiradoj.

Tiu unua libertempa nokto, en tia malnova ruldomo, preskaŭ ruinaĵo, estas tro mallonga. Je la sesa horo matene, la infanoj, jam vekitaj, ridas sidante sur siaj matracoj.

Mia fratineto kaj mi deziras ankoraŭ dormi. Ni ŝatas dormi ĝis la forviŝo de laciĝo.

Mi montras grandajn severajn okulojn kaj ordonas:

-REKUŜIGU kaj DORMU.

Mi malkontentigas.

--SILENTU la infanoj, ĴOĴO ankoraŭ dormas!

--Sed FRANCINE. La suno alte brilas en la ĉielo, tio signifas ke ni devas ellitiĝi!

NAIMA kaj MALEK, sekrete, preparis bongustegan teon, nia bonhumoro vekigas nin al la granda tago. Forgesita la manko da dormo!

Ni devas prepari nutraĵon sur la fajro tuj sur la grundo, esti atentema por kontroli la fajron pro timo

ke ĝi malfajrus. La infanoj tuj komprenis kaj prizorgas ĝin kun la risiko sin bruli.

-Estas same kiel en la malnova tempo FRANCINE!

Ĉie ĉirkaŭ la fajro ni metis arbajn trunkojn laŭ duona cirklo tuj sur la grundo kun la fajro meze. Ek de multaj jaroj tiuj trunkoj estas niaj seĝoj. Kaj ek de multaj jaroj tiu loko loĝigas multajn etajn estulojn, kokcinojn, lacertojn, skarabojn. La infanoj malkovras aliajn vizaĝojn de la arbaro.

ĴOĴO kaj mi scivolas scii ĉu ili montros sin. Ĉiu foje, ili mirigas nin kiam ili eliras el la trunko sur kiu ni sidas, ek kiam ni fajrigas fajron por kuiri nutraĵon. Majeste, ili metas la nazon eksteren. Ili sin eltiras malrapide el la frostaj cindroj de la antaŭa fajro. Mirinde, ili belas kvazaŭ diinojn.

Belegaj amfibioj, kiuj baldaŭ malaperos, ili elektis la ĴOĴOan grundon por renaski al la vivo. Kun la infanoj, ni longe observas ilin kaj ĝojas pro la privilegio malkovri tiujn mirindajn belaĵojn, ili malfermas nian apetiton.

La postamezon ni iras por vidi aprojn en la arbaro. Ni neniam vidis, sed ni scias kie ili trapasas.

Ni rakontas ke nia granda frato estas la sola kiu vidis, iun el ili, promemante. Li devis forkuri kaj grimpi sur arbon. Li devis atendi horojn ĝis la momento kiam ĝi foriris. Estis dika virapro.

Tiu historio timegas la infanojn. Kaj ni ankaŭ timegas. La plej eta bruo timegas nin, tial ni reiras al la proksimeco de nia granda hundino LEIKA, ŝi grandas kiel lupoj.

-Ne timu infanoj la aprojn ne alvenos, ili sentos la odoron de LEIKA kaj prudente restos for. Kaj se LEIKA vidus apron ŝi ŝirus ĝin kaj ĝin kaĉigus.

Fino de la tago ni konstruas baraĵon en la rivereto.

La duan nokton en la ruldomo, la infanoj estis tiel lacaj ke ili dormadis peze.

Tiam...

ĴOĴO kaj mi, piedfingre, en ĝojeca silento, reiras apud la fajro kun nia ŝatata vina PORTO botelo; ĝi malpleniĝas rapide. Mi ŝatas PORTON nur en tiu ĉi loko kaj nur kun mia fratineteto, kiam tago malrapide foriras al la nokto. Ni preskaŭ ne parolas, aŭ flustre, preskaŭ silente kaj nia murmuro ampleksas nian ĝojon esti perditaj en tiu ĉi arbaro. Ni ŝatas la fratecan kuneston tiel unikan, parfumitan de la fajra kaj PORTO odoroj.

Kune, kun ĝojego ni rekonstruas niajn vivojn kvazaŭ estus la vero! Kaj kun steletoj en la kapoj ni eniras inter infanoj por dormi en bonega etoso.

Por nia plej granda feliĉo, la infanoj dormis ĝis la deka horo, la arbara aero dormiginte ilin.

Post la matenmanĝo, ni iras viziti kastelon de GODEFROID de BOUILLON. Ni miris pro la tortura salono, la infanoj ŝategis, ni iradas fiere, onklino ĴOĴO kaj mi kiel se la infanoj estus niaj.

-FRANCINE: tio estas belega ĉi tie la uloj ne estas rasistaj.

Tiu pensado de MALEK ravivas doloron ĉe mia stomako. Mi bone komprenas la impreson de tiu malakceptita infano, mi ne scias kion respondi sed mi sentas ke tio dolorigas min..... kaj mi deziras preni lin en miaj brakoj, konsoli lin pro tiu sento de malakcepto kiun li jam forte sentas.

La koloro de liaj okuloj kaj la fajneco de lia vizaĝo kantas la ekzistadon de lia kulturo, de alia mondo, de aliaj kredoj. Sed la scivolemo, lia deziro kompreni, lia spiriteca viveco, liaj ridantaj okuloj, lia BRUSELA akcento kantas BELGION.

La sango de MALEK venas de lando kie la suno enskribiĝis en sia haŭto, la varma tero de MAROKO donacas amon ĝis la plej profundeco de belga ARDENO kaj tie varmigas ĉion de supro al subo.

Onklino ĴOĴO kaj mi revenas, reunigitaj de tiu marokardena ĉeesto meze de ardenoj.

La infanoj de la vidalvida domo konservas tiel trezoro la memoron de tiuj ardenaj tagoj.

Dankon onklino ĴOĴO por tiu loko kie parteto da feliĉo kantas, protektita de la mondo.

## La juna viro sen nomo.

-Saluton sinjorino, mi aŭdis ke vi donas kurson pri franca lingvo aparte.

Mi just parkis mian aŭton sur strato paralela al mia loĝejo.

Juna viro, beleta preskaŭ dek ok aŭ dek naŭ jaroj ridetante alproksimiĝas min. Mi neniam vidis lin. Li estas fleksebla kaj agraba kaj sin esprimas per perfekta franca lingvo. La vetero malvarmetas, li estas sporte vestita.

Unue, mi iom fieretis pro lia tiela alproksimiĝo. Mi respondas afable.

-Okazas ke mi helpis, intertempe, infanon, kiu havis malfacilaĵojn kun la franca lingvo, sed tio ne estas profesie. Mi bedaŭras.

Li marŝas apud mi, parolante, sen nenia signifo por mi. Kaj ni iris je direkto de mia domo. Mi trapasis antaŭ la muzulmana spicejo kie mi salutas la ulojn same kiel mia kutimo. Ili respondas per signeto de la mano.

Sed en la magazeno de MOHAMED pluraj viroj sin peze interrigardis. Mi sentas ian timon en ilia rigardo. Kvazaŭ averto antaŭ danĝero, mi suspektas ekvidi movon tiel kiel malbonaj diraĵoj instalas inter ili.

JUSEF, la patro de la infanoj de la vidalvida domo, estas inter ili, la aliaj rigardas lin. Li forlasas komercejton kaj venas apud mi. Li alparolas min ĝentile pri la pluvo kaj bela vetero, pri aĵoj sen valoroj.

Mi surprizas, mi pensas ke li volas diri ion gravan al mi. Li okupas la tutan lokon. Lia ĉeesteco komencas ĝenigi min. Ni alproksimiĝas mian loĝejon kaj JUSEF malrapidigas la iradon.

Kurioze la juna viro hezitas. Li ne plu diras ion, lia sinteno iĝos hezitanta kaj malcerta. Mi rimarkas liajn okulojn, eta ruĝa pinto brilas meze de ili. Lia rigardo malpleniĝas kaj forkuras. Sed mi ne priatentas al tio kaj mi ne komprenas kial JUSEF ĝenas nin. Mi volus ke JUSEF foriru. Kiam subite mi rimarkas ke la juna viro forkuras, li malaperas sen ion diri, sen bruo sur la piedfingroj.

JUSEF, li estas ankoraŭ apud mi. Li daŭrigas alporoli min per sia varma voĉo pri ĉio kaj nenio. Plenplene surprizita pro tiu spontaneca foriro, mi promeniĝas mian rigardon en la strato.

En tiu momento JUSEF elektas retiri sin, amike kvazaŭ nia renkontiĝo estus la plej simpla en la mondo.

Mi malfermas mian dometan pordon. Mi konfesas ke mi tute estas konsternita, komprenis nenion al kio okazis. JUSEF reiris al la spicejo kaj mi malkontentas pri li.

Vespere MALEK vizitis min, la naskiĝanta fraŭleco ekmontriĝas en lia fajna korpo.

Li scias ke mi ŝatas lin; li estas iom kiel mia dua filo kiun mi neniam ricevis. Li parolas pri la juna viro kiun lia patro rimarkis kiam li akompanis min. Tiu viro estas konata kiel drogito kiu atakas pri iu ajn pretekstoj.

-Vi komprenas FRANCINE: li iam vizitis plurajn fojojn malsanulejon por maldrogiĝi, li povus esti danĝera.

Vidante la subitan ŝanĝon de mia kapo, li aldonas:

-Ne plu timu, li ne plu alproksimiĝos vin, li scias ke ni tranĉus sian kapon.

## La alaha infano

La infanoj de la vidalvida domo plenkreskas.

NAIMA estos baldaŭ dek kvin aŭ dek ses jara. Ŝi pleniĝas je vivo, plena da espero. Ŝi estas tute plena? Ŝia korpo mutacias. Ŝi pli belas ol estus ebla.

Ŝi estas la plej aĝa. Ŝi vizitas min ĉiun tagon post la lernejo, kun libro en la mano, tio estas preteksto por resti kelkajn minutojn kun mi en mia domo. Ŝi rakontas siajn sekretojn, siajn malkontentiĝojn kaj esperojn.

Mi malfermas la pordon al ŝi, mi aŭskultas ŝin. Mi sentas ke ŝi malfermiĝas al la mondo, ŝiaj gestoj deziras ĉion malkovri. Ŝia vizaĝo, ŝia korpo alvokas vivon el ĉiuj flankoj. Sed lastatempe, mi sentas etan ribelon kiu komencas instaliĝi en la fundo de ŝiaj okuloj. Apenaŭ ĉe mi, la kapo alta, la rigardo brilanta ŝi ekdancas, ŝi havas sekretan ameton.

Li ne estas el bona knabo familio por la gepatroj de NAIMA. Sed ŝi primokas. Ŝi ŝatas la vojon kiun li elektis por plenkreski. Lia junuleca delikta irado altiras ŝin.

Li saltis el la adoltan mondon, provokante ĝin. Kaj societo reĵetis lin al la socia morto. Sed li ne malkuraĝis kaj tion ŝi trovas eksterordinara ĉe li.

Inter ili, la interkompreno trapasas tuj. Ŝi malkovris sensamon tute novan, kun li. Ŝia korpo de junulino vibras ravite. Ŝi sciis elpreni la mildecon kaj donacemon kiujn tiu fraŭlo kaŝis en si mem. Ŝi emociiĝas kaj malpeziĝas kiam ŝi parolas pri li.

Mi aŭskultas ŝin kun timeto (-al NAIMA). Kiel reagos ŝiaj gepatroj.... kaj ŝiaj fratoj kiuj rigardas atenteme por ĉiam kontroli ŝin.

Mia eta NAIMA. Kiel mi dezirus danci kun ci, la malkovro de la vivo enirante en cian korpon!

Mi bone vidas ŝiajn fratojn turni ĉirkaŭ ŝin kaj observi la plej etan gesteton. Mi bone vidas SALMAN la panjon, kiu sindemandas pro la ŝanĝo de la sinteno de sia filino. Tiel obeema, tiel facila antaŭe.

Kaj ke ŝi malesperas pro tiu tuja ŝanĝo. Mi scias kio okazas. NAIMA kontraŭdiras nin, ŝi sin ribelas, sed kio trapasas en sia kapo?

-Ĉu ci scias FRANCINE?

NAIMA estas apenaŭ en mia domo ke la sonorilo sonas tiel por ĉion rompi.

-NAIMA tuj devas reveni, panjo vokas ŝin.

NAIMA furiozas, ŝi eĉ ne havis tempon por sidiĝi kaj iom paroli. Ŝi devas rehejmiĝi

por helpi sian panjon por la kuirado kaj purigado en la domo. Ŝi revas pri libereco.

Mi komprenigas al ŝi, ke ŝi devas iri. Mi bedaŭras por ŝi, mi sentas min senpovo. Mi forte brakumas ŝin.

La sonorilo sonas fortege.

-Ha, ve, ve! Tio estas bona nu, NAIMA alvenas.

-Pardonu FRANCINE, sed urĝas, la bebo akvumiĝis tute. Li sentas malpure, NAIMA devas ŝanĝi liajn vestaĵojn.

SALMA, la panjo, staras antaŭ la domo. Ankoraŭ ŝi tute rondas kaj baldaŭ naskiĝos nova infano.

Estos la deka alvenonta al tiu ĉi mondo, en tiu familio. Estas kvazaŭ se NAIMA mem portus la panjan infanon. Ŝia panjo naskas preskaŭ ĉiun jaron, kaj la beboj rapide alvenas ĉe kaj en la brakoj de NAIMA.

SALMA observas mian domon kun stranga rigardo. Mi alsignas ŝin per trankviliĝita signo. Mi trairas la straton tute simple kaj diras naive:

-SALMA, ci tiel belas, kiam alvenos la bebo. Sed naŭ infanoj estas jam multe ĉu?

-Sed FRANCINE estas ALAHO kiu sendas la dekan.

-Jes sed en Belgio malfacilas tiom da infanoj. Tio multe kostas pro la lernejo, vestaĵoj, nutraĵoj. .... ci scias SALMA, havi infanoj estas pli ol porti ilin en sia ventro.

-ALAHO diras ke ni devas pripensi pri la infanoj. ....

Miaj paroloj eliris mian buŝon spontanece, tiel rapide ke mi hontis. Jen ke mi parolas pri ALAHO nun. SALMA momente silentas, rigardas min rekte al la okuloj kun respekta sinteno. Mi kredas ke ŝi komprenis mirinde, mi timis ke mi tro diris. Mi timis ke mi spitĉagrenis ŝin.

Tuje, mi rimarkas pacan sintenon en ŝiaj okuloj, ia ridema venko kun ameco. Mi konfesas ke mi surprizas.

-Sed FRANCINE, ALAHO metis cin sur nia vojo por la infanoj.

Mi restas kun malfermita buŝo.

-Tie... SALMA ĉu ci nekredas?

Celi tuj ĉe la trafo?

Mi havas nenion por fari kun ALAHO.

-Jes mi estas sur la sama vojo kiel ci. Mi loĝas la vidalvidan domon.

Mi ne konas ALAHO, nek iu ajn de la supro. Sed evidente mi konas la infanojn, sed ciaj infanoj eniris mian vivon. Simple dank' al rulŝuglitoj. ALAHO, ALAHO.

Mi trairas la straton, rehejmiĝas, mi laciĝas, fajrigas fajron. Enmetas min en la arbaran fajran odoron.

Mi pensas al mia infano. Li plenkreskis, blondulo kaj ĉiele bluaj okuloj. Li finas siajn kuracistajn lernadojn. Sur mia vojo neniu estis! Sola kun mia infano. Kelfoje estis malfacile sur tiu ĉi tera grundo.

Mi glitas en komfortan dormon. Mi revas kun feliĉo al la infanoj de la vidalvida domo: NAIMA, KARIM, MALEK, ILIAS, MEHDI, HIŜAM, AMINA, OMAR KAJ JUNES. ....

*Kaj en mia, revo mi kun SALMA . ... Ni du rigardas al ĉielo. Ni etendas grandan senmakulan blankan tukon kaj tie ni ricevas, ridante, tiujn ŝalitaĵajn infanojn de supre el la ĉielo resaltante sur la tukoj kiel donacoj ne atenditaj de la vivo.*

La sonorilo sonas kaj rompas mian stelan promenadon!  
Kolero eniras mian korpon. Tiu sonorilo ne kompatas, baldaŭ mi detruos ĝin. Mi ĵetos ĝin for kaj tiam mi pacos en la bonego de mia soleco.

Sed tiun fojon estas HIŜAM la plej bela infano kiun mi konas, li brilas de ia varma kaj diskreta suno. Li baldaŭ estos naŭ aĝa:

-Ha mirinde! Estas bonege, okdek du procento kaj ci estas la dua de la tuta klaso. Venu, eniru...

Mi malkontentiĝas pri tiu lerneja direktoro kiu volis lin malsuprenigi de unu nivela klaso.  
Mi malkontentiĝas pri tiu instruisto kiu ne rimarkis la intelektan potencon kiu brilis en la okuloj de tiu infano.

Kaj plie, mi malkontentiĝas kontraŭ la tuta mondo kiu daŭrigas iradi kvazaŭ nenio okazus!

## la edziĝa demando

Jam unu semajnon kiam NAIMA ne venis viziti min, mi maltrankvilas, mi observas la vidalvidan domon diskrete sen pacienco: ŝajnas iu malesto kiun mi tute ne komprenas!

Subite, malantaŭ kurteno de sia ĉambro NAIMA aperis momente. NAIMA hele aspektas kiel la luna koloro en la nigreco de la nokto, ŝia beleco tristas. Ŝi aspektas lacigita. Rapide mi sendas manan signon al ŝi. Ŝi foriras de la kurteno. Ŝia vizaĝo diras ne. Impreso de malakcepto enestigas min ĝis la ostoj.

Mi deziras kriegi ŝian nomon, NAIMAn, NAIMAn.

Ŝiaj fratoj apenaŭ rigardas min. Mi sentas ke la plenkreskuloj evitas min.

La etulo HIŜAM finfine konfesas ke sia fratino estas punita. Ŝi devas resti en sia ĉambro. Kaj li aldonas; ŝi rifuzis fianĉon, FRANCINE. La infano bone rilatas kun sia fratino kaj ili konsentas inter si.

HIŜAM ne scias pli, li ŝategas sian fratinton kaj li ne deĵoras tiom la plenkreskulojn atenti al la frekventoj de NAIMA.

NAIMA, 16 jaroj, enkarcerigita ĉar ŝi rifuzas fianĉulon kiun ŝi ne konas. NAIMA, 16 jaroj, kun en la fundo de sia koro sekretan ameton kiun ŝi konservas en si mem.

Tiun fojon, por mi, la glaso tro pleniĝis, mi ne plu majstras min, mi premmortigus ĉiujn, rompus ĉion, malkonstruus. ....

Mi trairas la straton. Sonas fulmoĵetante. Mi ne plu tenas min. Mi pripensas al NAIMA.



La panjo ricevas min en la komuna ĉambro, ŝi atendis min ekde longa tempo kaj ŝajnas feliĉa pro mia vizito. Ŝi verŝas varmegan teon al mi. Ŝi bone scias kial mi venas kaj provas klarigi. Mi aŭskultas ŝin. Ŝi bedaŭras pro la situacio de sia filino. Mi aŭskultas. .... laŭ ŝiaj mallertaj vortoj kaj mi sentas ŝian timegon.

Tio ne normalas FRANCINE, por la tria fojo. NAIMA rifuzas fianĉon. Unua fojo, bone. Dua fojo, konsentite. Sed tria fojo, temas pri filo de bona familio. Li lernadis, ŝi estos bele kaj bone kun li.

-Ĉu ci scias kion fari, FRANCINE.

-Antaŭ la tuta familio de tiu fraŭlo? si fulmrapide fermis la pordon kaj kriegis ke ŝi ne volas edziĝi! Ni hontas FRANCINE! Ŝia patro kaj mi estas malkontentaj. Ŝi estas punata.

La panjo rigardas min. Ŝi atendas mian reagon, mi ne scias kion diri. Mi amas SALMAN, la panjon. Ŝi estas tute rondiĝita, tute milda kaj en si mem deziras bone fari ĉion.

Mi levas min. Mi estas sen povo. Mi nur povas brakumi ŝin. Mi ĉirkaŭbrakas ŝin en respekta silento. La spicaj odoroj venitaj de fora mondo intermiksiĝas kun miaj fajrigitaj brulitaj lignaĵoj.

-Ĉu ci scias SALMA, estas eble tro frue, NAIMA ne pripensas al edziĝo. Ŝi kontentiĝas resti apud vi kaj ŝatus viziti la lernejon. Ŝi bezonas ankoraŭ multe lerni. Kaj, kaj, kaj?

Ĉu mi tiom malhonestas, ĉu mi ne devus ĉion rompi, malkarcerigi NAIMAN de la pezo de la tradicioj?

-Ci vidis SALMAN post unu aŭ du jaroj.

-Jes FRANCINE, sed ci scias Ŝia patro. ....

-Ŝia, patro, ia patro.... mi bone scias ke ĉio estos decidota de ci, estas li la estro de la familio sed fakte, estas ci kiu estras la domon. Ĉu SALMA?

Rehejmiĝinte, mi ne tute maltrankviliĝis pri kion ili faros kun NAIMA. Kaj ĉu ŝi konsentos? NAIMA reiris al la lernejo. Mi sentas ŝin defensiva kun sento de maljusteco en la gorĝo.

Mi rezignas!

Mia domo estas kiel parto de ilia. Kaj pro la irado de la tempo, ĝi ekestis (la dom) iomete kvazaŭ ĉe ili, ilia teritorio. Ilia paca haveno kiam ili bezonas kvietecon., aŭskultadon kiam malĝojo ĉagrenas ilin iom tro forte.

## LA ENTRUDIĜINTO.

Dum rekonstruado de la mondo, antaŭ ruĝa vina glaso ĉe la trinkejo la "GASPI" mi renkontis la entrudiĝinton.

Li belas, fleksebla atleta korpo.

Indiferantaj okuloj, kies koloro aspektas oceanan akvon, adolto disradias jam maljustecon pro la trapasita viva pezado. Lumeto da espero en la flamo de sia deziro. Li solas kun la trinkejaj mebloj.

Li rigardas min ŝajnante foresti.

Mi al li resendas lian ĝentilan rigardon. La mistero operacias kaj mi subakviĝas per ne konscia fido, al la silenta alvoko de lia amemo. Mi pensas!

Je la profundeco de la maro.

Lia haŭto mildas, li palpas kiel infano kiu serĉus aliecon. La vina botelo akompanas nin. Mi parolas kaj la sono de mia voĉo aspektas kareson. La vino enigas nin per mildeco. Ni lulas kaj entutigas niajn korpojn laŭ stranga febro.

Je la sunleviĝo, la suno ankaŭ varmeta en la nokto, mi foriras lian ĉambron piedfingre sen vekti lin.

Mi rehejmiĝas kaj la gajviglo de tiu ĉi renkontiĝo milde kaj pace beligas min interne. Estas kvazaŭ revo refortigus nin jam ni refalas teren.

Mi feliĉas trovi min. Mi duoniĝis inter la deziro paroli pri la ekzisto de tiu nedeziritulo aŭ konservi la sekreton.

La sonorilo, sen kompatato, sonegas! Ha mi tute forgesis ĝin!

Du infanoj de la vidalvida domo, KARIM kaj MALEK, staras sur la trotuaro. Mia kapo sidas ankoraŭ en la nubojn. Mi enirigas ilin. Tiam mi konstatas ke mia domo estas malordigita. La infanoj, tute ne ĝenitaj, decidas helpi min reordigi la tuton.

-Bone FRANCINE, ni helpas cin.

Post du aŭ tri movadoj, la knaboj transformas sin, laŭ loĝejaj diinoj: alsuĉilas polvon per maŝino, remetas ĉion je ĝia taŭga loko....

-Tio bonegas, miaj knaboj.

Ili tute ridetas kaj belas kvazaŭ dioj. Mi brakumas ilin pro kontentiĝo. Mi ekdancigas kaj kisas ilin.

Ni tri transportitaj pro ĝojo kaj ligo ĝis fino de la tempo.

Ankoraŭ feliĉa pro kio okazis, mi subite demandas al ili kion ili deziris?

- FRANCINE....

Tute surprizita komenci samtempe, la du knaboj ekridegas kaj tuj haltas. Ili turnas sin al mi:

-Bone jes, kio, mi aŭskultas vin.

KARIM la unua heziteme lanĉas.

-Hieraŭ, oni ne vidis cin, ne estis lumo ĉe ci.

MALEK daŭrigas kaj diras kun firmeco.

-Ĉu ci ne dormis hejme, FRANCINE?

Ĉu mi devas konfesi min? Ĉu mi devas diri ke tiu ĉi nokto, mi estis kun amanto? Ĉu ili rajtas eniri en mian intiman vivon, tiuj knaboj de la vidalvida domo.

Kaj plie: kio estas amanto por KARIM kaj MALEK, ili du, apenaŭ ĉe la komenco de la vivo?

Pluraj demandoj trairas mian spiriton. La du knaboj rigardas min. Ili beletas, mi cedas!

Mia domo estas kvazaŭ plilongigo de ilia domo, de la infanoj de la vidalvida domo.

Dank' al la tempo ĝi ekestis ilia grundo. Estas ilia paca loko. Estas tie kie ili venas por trovi kvietecon, aŭskultadon aŭ kiam ili tristas kiam la penoj tro grandiĝas.

Mi estas partigita inter la deziro paroli pri la ekzisto de la enstrudiĝinto aŭ konservi sekreton.

Mi haltas momente. Mi rigardas ilin rekte al la okuloj kaj elektas anonci milde:

-Vi pravas, mi ne rehejmiĝis, mi dormis ĉe amanto.

Kaj aldonas fripone ridetante:

-Sed vi spionas min, mi kredas!

-FRANCINE, estas ĉar oni ŝatas cin, ni malkvietiĝis.

Sed la du knaboj ne finis diri tion, kion ili deziris diri.....

-FRANCINE, vi scias kial ni estas tie ĉi, diras MALEK firmstare.

- u vi ne bezonas viron tiam? tuj aldonas KARIM.

Tiu reago pensigas min.

Kaj se ili pravus. Kaj se kiel estonta viro, li scias kio okazos. Ĉu ne konscie ili antaŭsentas kio okazos? Ĉu tiu entrudiĝinto ankaraŭ for nun, ne estas minaco? Ĉu li renversus min?

La du infanoj, sen vere konscii, ĉu ili divenis ke la entrudiĝinto ŝanĝos la radojn. Ĉu ili tiel antaŭvidas?

Mi ne tro scias kion pensi.

Sed en mi estas sengardemo kaj mi ne volas ke la entrudiĝinto enirus mian domon.

## La tagoj pasas.

La entrudiĝinto forlasas miajn revojn.

Vespere, mi iras al trinkejo la "GASPI", mi serĉas lin en la ĉeestantoj naive! Dumtage mi trapasis hazarde en lia strato, mi nature esperas renkontri lin. La entrudiĝinto aspektas, kelkfoje, stranga. Li malaperas de la iradlokoj dum pluraj semajnoj, sed mi sentas nenian mankon pri li kaj lia silento pacigas min.

-Priatentu FRANCINE: iu ajn, sed ne li!

-MARCEL ci diras tion ĉar ci ĵaluzas.

Mia amiko MARCEL aldonas per varma voĉo balancante la manon:

-Mi avertis, vi scias kion fari FRANCINE.

Tiu malfido de la aliaj pri la entrudiĝinto, tiu stranga sinteno kaj silento kiu ĉirkaŭas lin, vekigas en mi ian maltrankvilecon kiun mi tuj forviŝas.

Mi amas la silenton de siaj okuloj, kiuj sur min pezigas ĉien sur mia korpo same kiel oni rigardus ekŝvebantun birdon. Mi amas lian silenton kaj lian forestecon.

Mi renkontis la entrudiĝinton, tio estis nerenkonto kiu sekurigas min: la silento de niaj altiroj unu al la alia fidus min; entrudiĝinto ne eniras en mian ekzistadon. .... sed mi trovas bonhumoron kiam mi pensas ke ie li eble atendus ke mi aperus.

Li ne eniras mian vivon, tio estas gajnita!

La infanoj de la vidalvida domo, ili eniras mian vivon kun feliĉo sur mia vivo. Ili invadas mian domon kaj mian spiriton. Ili stariĝis pli kaj pli en la realeco de mia ekzistado. Kun ili mi daŭrigos mian vojon. Mi benas ALAHOn pro la suno sur ĉiuj el iliaj vizaĝoj kaj por la flameto kiu brilas en iliaj okuloj.

Sed tiun ĉi vesperon mi estas maltrankvilita pro la paroloj de mia amiko MARCEL. Plie mi laciĝis pro tiu ĉi deĵoro ĉe ofico, mia laciĝo min rompas pro sociaj kialoj. Kiun mi vidis dum la tago sen fino. Ĉiuj envenintaj personoj en mian deĵoran oficejon, enverŝis siajn vivajn malfeliĉojn, siajn suferojn, siajn plorojn. Mi hontas pro mia afableco por helpi ilin survivi. Mi sentas min pezan pro tiuj

humanaj malfeliĉoj kiuj traserĉas en mia rigardo iom da espero.

Mi ne esperas.

Mi ne povas fari.

Mi bedaŭras.

Mi rehejmiĝas.

Mi malpacienas, malplenigas mian kapon pro ĉiuj priokupoj. Mi ŝatus esti en mia dometo, enplonĝi en la solecan benon. Mi ebrias pro la fajraodoro. Kuŝita sur la kanapo kaj gustumante malrapide bongustan ruĝan vinan botelon, mi refaros la mondon, foriros en revan dormon.

Mi marŝas al la domo. Tiun ĉi vesperon mi deziras ebreigi min. Mi rapidigas miajn paŝojn, mi rehejmiĝas.

Mi distingas sidantan formon sur la ŝtupoj antaŭ la pordo.

Ha, ne, ne tiun ĉi vesperon.

Bonvolu universo!

Bonvolu pluvo!

Bonvolu grizeco en la ĉielo!

Helpu min la vento!

Ne tiun ĉi vesperon! ne tiun ĉi vesperon!

Tiun ĉi vesperon, mi devas digesti la mizerojn de tiu ĉi tero per bona vino.

Mi bezonas lavi min, min purigi de la travivaĵoj de la mondo. Mi volas esti sola, tute sola; mi naŭzas pro socia ĵangalo.

La infano sidas saĝe antaŭ mia pordo, sia kajerujo sur la genuoj. Li rigardas al mia direkto. Videble li atendas min. Sed kion li faras tie! Kolero trapasas mian spiriton. Mi preparas reĵetan paroladon. Mi diros al la infano ke mi havas nenion por solvi lian problemon. Mi elverŝos sur lin mian furiozan kontraŭon, mian ruĝan koleron pri tiu ĉi mondo.

-HIŜAM!

Li, tie en la atenda kvieteco, sidas antaŭ mia pordo. Li levas sin.

-Mi kontentas vidi cin FRANCINE?

Je la profondeco de lia voĉo ŝprucas perletoj kiuj resaltas en la lumo de tiu griza vetero.

La infano kun mi eniras la domon.

Ni fajrigas fajron.

Silente, ni odorsentas fortege la arbarajn odorojn; la infano instalas sin.

Li havas sian sidangulon. Li faras siajn lernejjajn taskojn, lernas siajn lecionojn.

Li ne plu bezonas mian helpon. Li trovis sian lokon en la paciga dometo.

Sonorilo tute fiera sonas ĝoje.

HIŜAM sin levas kaj malfermas la pordon laŭ grandega sinjoro, li diras laŭte al mia direkto.

-FRANCINE, FRANCINE estas mia fratino AMINA; ŝi alportas kuskuson specialan hejman nutraĵon faritan de mia panjo.

Dankon universo!

Dankon la pluvo!

Dankon la griza ĉielo!

Dankon la vento!

Kaj ĉefe dankon al SALMA!

-Panjo diris ke vi devas trinki teon kun tiu ĉi nutraĵo. Ŝi preparis tutan teon termbotelon por ci.

Kiel belas la vivo kiam ĝi donacas specialan nutraĵon tute varman venitan rekte el Maroko ,  
akompanatan de la landa suno, kiu rakontas la mil unuajn noktajn historiojn!

Kiel belas la vivo kiam ruĝa vineto fluas sekrete por akompani tiun nutraĵon venitan de alia mondo!

## La tria oktobra Vespero.

Tiu vespero ĉe "GASPI" la entrudiĝinto agitas, li parolas pri praktika problemo kiu turmentas lin;  
la domo kie li loĝas estas vendita kaj li devas foriri kaj la domo kiun li aĉetis ne ankoraŭ taŭgas por  
loĝi. Li estas ĉagrena, mi neniam vidis lin tiel.

Mi aŭskultas lin sen kondiĉoj, mirigita pro lia voĉa sono. Li fore rigardas serĉante ion. Li rigardas  
alie. Mi sentas ke li atendas ion malkvieta. Mi dezirus luli lin, kvietigi lin kaj sen pripensi  
-mi lancas kun mildeco:

-Ci scias, se ci ne trovas solvon, ci povus enloĝi en mia subtegmento ĝis la momento kiam cia domo  
kiun ci aĉetis estus preta.

Tiu frazo eliris mian buŝon sen volo kun la rapido de fuĝanta stelo. Antaŭ je mi mem konsciu la  
signifo de tiaj paroloj, fulmo al mi lanĉas tondron nevideblan kiu traboras mian stomakon.

Sed la entrudiĝinto kvietigas min ĉe la sekundo mem.

Ne, ne, mi ne sukcesis trovi. Tamen post du aŭ tri semajnoj mia domo permesos loĝi.

Lia respondo trankviligas min. Sed mi malkontentas pro mia bezono ĉiam voli alporti konkretan  
helpon kiam malfaciĵoj aperas ĉe iu. Estas tuja reago kiun mi tute ne kontrolas kaj ofte mi perdas pli  
malpli.

Rezume, mi decidas ne plu iri ĉe "GASPI" dum kelkaj tagoj, timante esti denove antaŭstarigita al la  
loĝa problemo de la entrudiĝinto.

Tiun vesperon, rehejmiĝante de la laboro sub la fortega aŭtuna pluvo, la ĉiela akvo fluas sur mia  
vizaĝo laŭ stranga intensiĝo. Mi tamen en ĝi sentas ian mildecon. Mi amas pluvon rekte sur mia  
haŭto.

Alvenite antaŭ mia hejmo, mi ekvidas la infanon MALEK-n antaŭ mia pordo tute akvumita. Videble  
nervoza. Li min atendas.

-Ha, FRANCINE ci avenas, viro venis soni al cia pordo.

-MALEK ĉu ci gardas mian domon?

-Li stranga estis, mi ne ŝatas tiun viron FRANCINE. Li demandis ĉu ci loĝas tie ĉi.

Angoro frostigas mian sangon. Mi antaŭsentas ke temas pri la enstrudiĝinto.

-Oni diris al li ke vi ankoraŭ ne reheimiĝis de via laborejo kaj. ....

-Kaj kio?

-Tiam. .... li demandis min, ridetante, ĉu ni estus novaj policanoj de la kvartalo. Li metis leteron en vian leterkatolon.

Saluton FRANCINE, mi trovis nenion, mi konsentas pri via propono, dankon, mi venos vespere.

Fakte, vespere, la enstrudiĝinto staras antaŭ mia pordo.

-Fine, mi kontentiĝas por cia oferto, ci scias. Ci vidos: post unu monato, maksimume du, mia domo estos preta kaj mi foriros.

Mi montras al li la subtegmentan ĉambron lumigitan belegan spacon.

-Morgaŭ mi alportos kelkajn aferojn. Kaj mi estos modelo diskreta.

La enstrudiĝinto ordigas la subtegmentan ĉambron kun bona aspekto kaj firmeco.

Li refarbas kaj reordigas la banĉambron. Li fajrigas fajron sen averto por surprizi min.

Li instalas sin en mia sovaĝa herbejo. Kaj pensas utile barigi la ĉirkaŭon.

La enstrudiĝinto posedas mian domon kaj mi komencas malspiri. Li malordigas mian vivon.

La sonorilo insiste sonas. Mi scias ke estas HIŜAM, mi rekonas lian sonmanieron. Tiri sur la ŝnuro kun ia plezuro.

Mi kuras al la pordo, sed la enstrudiĝinto antaŭiris min. HIŜAM estas ĝenita.

-Mi .... pardon...petas.. ĉu FRANCINE estas tie ĉi?

Kial estas?

Estas por miaj lernejoj taskoj.

Tio ne taŭgas tute ne, hodiaŭ estas dimanĉo, oni ne ĝenas la dimanĉon.

-Sed sinjoro estas por la lernejo.

-Sciu etulo revenu morgaŭ vespere.

La enstrudiĝinto revenas al mi kun rideto sur siaj lipoj:

Mi ne ŝatas Arabojn, ne estas nun ke ili enuigos min.

Mi miras.

-Sed tiu infano venis por mi. Tie ĉi estas mia kvartalo. Mi vivas ĉi tie, estas nur Araboj, bone sed mi estas bone akceptata. La infanoj estas ankaŭ miaj infanoj. Ili partoprenas al mia vivo, mi ŝatas ilin, mi bedaŭras por ci.

Mi spiras profunde por repreni mian spiradon, por havi sufiĉe da fortoj por kriegi:

-Tiu estas sanktaj infanoj, mi ne volas ke ci tuŝu nur al iu el liaj haroj. Kontraŭe mi detranĉus cian kapon!

Mi tranĉus cian kapon!!! tiu kutima diraĵo ĉe la infanoj de mia strato. Kaj en mi mem, malgraŭ la kolero, mi ridetas kun gajeco.

La enstrudiĝinto supreniris al sia subtegmenta ĉambro. Li restis tie plurajn tagojn. Li ne plu iris labori. Kaj lia domo ne progresas de iu najlo. Kiam li trairas la stratojn, liaj okuloj kaŝitaj per nigraj rondaj okulvitroj, li kunportas trezorece grandan plastikan sakon en kiu estas granda hakilo. Hakilo.

Tiu ĉi foje mi ne povis konsenti. La infanoj de la vidalvida domo ne plu eniras mian domon pro timo. Mi eksplodas de malkonsento. Mi repensas al mia amiko MARCEL kiu avertis min. Senkoncie mi rifuĝas en indulgon de lia milda korpo. Ĉe MARCEL, mia ĉiama amiko, mi ploras en liaj protektantaj varmaj brakoj.

La infano HIŜAM sole kuraĝas kaj daŭrigas viziti min regule, malgraŭ sia timo trovi sin nazo al nazo de tiu enstrudiĝinto. Mi sentas min malbone ke li kapablas ataki la infanojn. Mi ne volas ke li tuŝu ilin. Ili estas tiel la radikoj en mia vivo kaj en mia karno.

Mia filo klarigas al mi ke la enstrudiĝinto enhavas dupolusan cerban malsanon: dum periodo li estas tute agitita, perdas kontakton kun realeco, faras multajn stultaĵojn kaj iom post iom revenas al la realo. Li ne konscias pri kio li faris. En tiu momento la mensfrapo malfaciligas al li. Li retrovas sin reĵetita de siaj amikoj.

Li falas tiam en periodo de malvigleco kiu ĝi lin fermas. En malgaja silento kaj demandemaj mildecoj. Dum tiu periodo li estas tiel agrabla, ĝentila kaj kortuŝa.

Mi estas atentema kaj diskreta, sed li havas nigrajn pensojn. Li sentas sin altirita al alia mondo, al la supro. Li volas forigi la vivon. Ensalto per grandega salto. Estas malfacile kontraŭbatali tiajn dezirojn mortigi sin.

Mia filo provas persvadi lin sekvi kuracadon: monatoj kaj monatoj pasas kaj la enstrudiĝinto estas ankoraŭ ĉi tie, sin Kuracigi, li ne volas. Li timas ke la kvanto da medikamentoj malfortigu sin.

La infanoj de la vidalvida domo restas en sia domo pro timo kaj pro respekto.

La gepatroj diris al ili: ke ili ne ĝenu "oni ne devas okazigi enuojn al FRANCINE pro ni".

Post unu jaro la enstrudiĝinto ne ankoraŭ foriris mian domon.

Mi provas diri al li ke li devas foriri ĉar mi ne plu povas loĝi lin.

La enstrudiĝinto tute perdiĝis. La vesperon li envenas en mian liton.

-Prenu min en ciaz brakoj, bonvolu,  
prenu min. ....

Mi doloriĝas, mi sentas tian frostecon kaj liaj okuloj foriras trans la muroj. La silento inter ni. Tiu fojo mi timas. Mi divenas lin forege.

Mi provas varmigi lin.

Mi diras al li ĝentilajn mildajn vortojn, sed lia korpo ŝtoniĝis; ek de la momento kiam li foriras, mi aŭdas lin murmuri du vortojn: mildecon, malgajecon.

Mia ventro doloras kiam li supreniras al la subtegmenta ĉambro, pezlamentas sian adoleskan korpon. Pezo pro la vivpezo de lia malsano.

Mia ventro doloras kiam mi aŭdas lin grumbleti helpajn vokantaj vortojn.

Mi sentas ŝtonigita, mi ne kapablas reteni lin por akcepti liajn suferojn. Li trapasos sole la nokton, kun tiu dolora pilko en miaj intestoj. Kaj mi trapasos la nokton sola, paralizita pro angoro, pensante al li.

## La kulera bruo.

Tiun ĉi matenon, ni kunestas en la kuirejo. Ni kune trinkas nian kafon. La entrudiĝinto kun belegaj kantantaj okuloj similas al la grandeco de la foraj maroj. Sed lia rigardo reflektas malesperon kiu spitas kontraŭ la muroj de mia dometo kaj resaltas laŭ miloj da sagoj kiuj vundigas min.

Li trinkas sian kafon, oni aŭdas kanti sian kuleron en la taso, tiun ĉi matenon, tamen male al ĉiu mateno la kulera bruo donas strangan melodion. La entrudiĝinto alrigardas min, vokante mildecon kaj reflektante sian malgajon. Du vortoj enkarcerintaj en sia gorĝo, kiu senĉese revenas, kiuj eliras ĉiun fojon kiam li malfermas buŝon, kiel funebra vento sed mildece kaj varmece. Tiu sinteno de malespero, kiu brilas kiel venkita suno meze de la somero, nervozigas min.

Nervoziganta tago koncernas la formadon de la oficistoj, tio atendas min ĉe la laborejo. Mi pensas al li sen ĉese. Mi kulpiĝas kaj ne povas pardoni min pro mia sinteno. Malgraŭ mi, du vortoj de la entrudiĝinto obsedas min, ili postkuras al mi. Mi kulpiĝas. Lia repetita diraĵo pri morto revenas al mia spirito kiel bumerango.

-(mi ne scias kion mi havas FRANCINE.)

Mi sentas lin puŝita per nekontrolebla forto kaj altirita per la furioza deziro morti.

Mi tute maltrankviliĝis repensante al liaj paroloj. Mi revidas liajn demandemajn okulojn pri mildeco. Lia malespero kriegas en la silento de mia memoro. Mi faldiĝas min laŭ kulpanta sinteno kaj riproĉas al mi tro rapidan pordofermadon tiun ĉi matenon en rifuzanta silento.

Mi alparolas pri tio al miaj koleginoj, ili trankviligas min:

-Ci ne devas tiel maltrankviliĝi, oni ne mortigas sin tiel!

Tamen mi maltranviliĝas. Mi subite sentas la bezonon vidi lin.

Same kiel aŭtomato, mi eniras mian aŭton kaj veturas al lia dometo por ke li kvietigu min apud la Lakena parko.

Bone, lia aŭto estas tie ĉi antaŭ la pordo. De ekstere tiu dometo aspektas varmece bela: jam dum pli da unu jaro li prizorgas pri ĝi. Laŭ ne regula ritmo, sed liaj manoj lertis.

La sensorila pordo malfermita, cimenta odoro trafas mian nazon kaj ĝenas mian gorĝon. Tagmezo kaj duono estas, mi ne aŭdas kutimajn bruojn pro laboroj. Mi supozis ke li eliris por aĉeti nutraĵojn.

Mildeco, tristeco tiuj vortoj mokspitas min meze tiun pezan silenton. Mi eniras kaj supreniras ĉe la etaĝoj per la helika ŝtuparo kun li mem instalis. Li enmetis ĉiujn ŝtupojn unu post la alia dank' al sia svito el sia frunto. La ŝtuparoj estas admirindaj. Mi malrapide supreniras.

Ĉe la etaĝo, nenio montras ian ĉeeston. La du vortoj de li obstine revenas al mia kapo. Mi vidas lin balanceti laŭ ĉiaj direktoj kaj trapiki mian ventron.

Mi hontas detrui lin tiel sen kompato.

Mi bedaŭras.

Mi parolas mallaŭte al la entrudiĝinto, mi maltrikos lian malfeliĉon kaj prenos lin milde en miaj brakoj per la tuta mildeco de la mondo.

Fortigita per tiuj bonaj deziroj mi daŭrigas supreniradon kaj alvenas al la subtegmento.

Tie, mi malekvilibras kvazaŭ fortoj foriris min.



Mi ricevas imagan pugnofrapon ĉe mian vizaĝon.  
Glavo trairas mian bruston trans la flankojn.  
Mi tremas.  
Mi ŝancelas.  
Mi momente konscion perdas, la enstrudiĝinto estas tie, meze de tiu grandega subtegmento.  
La enstrudiĝinto pendumis sin.  
Sur sia brusto papero, kun nur du vortoj skribitaj de ĉiuj koloroj, ili ilumigas tiun adoleskan korpon:  
Tristeco, mildeco.

Kontraŭe al la diraĵo pri pendumitoj,  
Mi trovis ke la enstrudiĝinto estas bela. Mi longe rigardas lian vizaĝon, li aspektas pacigita kiel post promenado en granda arbaro.  
Mi telefonas al mia kolegino.  
Mi telefonas al la policanoj.  
La policanoj apartigis min delikate.  
Jes li malvigligis, verdire mania malvigligado.  
Jes li estis en tia malvigligida periodo.  
Jes li parolis ofte pri sia deziro, pendumi sin.

La polico alvokis ambulanco.  
Mi volas vidi lin malrapide, oni malpermesas min. Mi insistas, mi volas lin vidi lastan fojon sen la ŝnuro. Oni rifuzas firme, ĉar laŭ ili li tro malbelegas.

La enstrudiĝinto foriris mian vivon per tiu ambulanco.

Mi reiras al la oficejo kun mia ĉagrenego. Mi strange staris, inter ĉielo kaj tero, mi ŝvebas, mi telefonas al mia filo, mi ploras dum unu minuto antaŭ povi paroli.  
-Li foriris, li pendumis sin.  
-Ci scias panjo, li estis malsana, li ne volis kuraciĝi, ci povis nenion fari.  
-Mi ne scias kion fari, mi estas perdita, mi rehejmiĝas.

Mia amiko MARCEL telefonas, ĉar li volus ke mi venu:  
-Ne dankon mi preferas sola resti.

Mi sentas la ĉeeston de la enstrudiĝinto ĉie en la spaco de la domo, sur la ŝtuparo, en la kuirejo, en la banĉambro. Mi ploretas laŭ inferna silento.

Sonorilo sonas de for, kvazaŭ senviva estaĵo, mi iras al la pordo por malfermi ĝin.  
-NAIMA.  
Ŝia vizaĝo spitas min pro sia beleco. Ŝiaj okuloj spitas solecon.  
Ŝia korpo tute dancas la printempon.

Mi ankoraŭ enhavas eksalton pro tristeco en la voĉo. La morto de la enstrudiĝinto balanciĝas en mia rigardo. Miaj okuloj brilas pro sufokitaj larmoj.

NAIMA haltas tuj. Ŝi sentas mian maleston, ŝi diras per plene milda tono:  
-Kio okazas mian karulino.

Mi estas mirigita pro ŝia ĝentileco, pro ŝia deziro konsoli min. Mi diras la ŝi la lastan veron: la enstrudiĝinto mortis. Por ne paroli pri realeco, mi nur diris ke li subite mortis pro aŭtoakcidento. Tiu

foje estas NAIMA kiu brakumas min fortege. Ni ploras kune , ĉiuj du! Kvazaŭ ni estus la solaj por porti ĉiujn malbonojn de la mondo.

NAIMA prenas tute plene mian doloron en sian adoleskan korpon same kiam mi mem ricevis ŝiajn larmojn en miajn brakojn. La parfumo de ŝia printempa korpo ŝvebigas min per kuraĝiga mildeco.

La entrudiĝinto foriris por ĉiam, kelkaj amikoj kaj membroj de mia familio venis ĉe la cindrigejon.

MALEK tute fajna, apenaŭ elirita de la infaneco estas tie, li rigardas min. Ek de la momento kiam la entrudiĝinto eniris en la flamojn, MALEK prenis mian manon en sia mano kun mildeco. Kaj mia korpo revarmiĝas. Mi sentas en mi furiozan deziron min premigi kontraŭ tiu infano falita de la ĉielo, iĝita mia filo.

Iom post iom la infanoj de la vidalvida domo elirigas min de la dormejo, kiu kaptis min neatendite. Neniam malagrabra parolo de iliaj flankoj venis por malpurigi la memoron de la entrudiĝinto.

## MUSTAFA.

Du knaboj staras antaŭ mia pordo. Ili tiel restas longtempe. Kaj ili rigadas la fasadon de supro al subo, sin rigardas unu la alian, ili hezitas.

Mi obsevas diskrete tra la fenestro. Mi ne konas ilin kaj ne memoras ke mi iam vidis ilin en la kvartalo. Finfine ili decidas soni. Ili ŝajnas mirigitaj kaj rekomencas. La sono sonoregas laŭ nekutima maniero plurajn fojojn sinsekve; tio nervozigas min.

Kion ili volis, tiuj junaj maturiĝantojn? Vendi loteriajn biletojn? Aŭ skribilojn por evoluigi la sportojn en la lernejo. Aŭ io ajn, mi ne scias.

Mia demandemo instinktive malfidas.

Mi malfermas la pordon kaj tuj metas min en defenda sinteno. Mi volas preservi min distanciĝante klare pro sekuro inter mi kaj tiaj maturiĝantoj.

-Bonan tagon FRANCINE.

-Bonan tagon, ĉu vi konas min?

La plej aĝa preskaŭ dek ok kaj la alia dek tri aŭ dek kvar. La plej aĝa parolas laŭ perfekta franca lingvo. Ni loĝas en tiu ĉi kvartalo . KARIM kaj MALEK de la vidalvida domo diris al ni, ke ni venu vidi vin.

Mi surprizas pro lia facileco kaj natura simpleco plene respektema per kiuj ili alparolas min . Mi min demandas kion alfalos sur mian kapon.

-Mi nomas RIDUAN kaj mia frato MUSTAFA li faris grandan stultaĵon.

MUSTAFA silentas, restas for. Mi observas lin. Li svelte tute belas, la glata hararo kaj vivecaj nigraŭbluaj okuloj kiuj ŝajnas trinki la vivon.

Malgraŭ la sinteno respondeca, la granda frato reflektas malkvietecon. Lia iom faldita korpo ŝajnas

jam atingita per la pezo de la vivo. Liaj okuloj enhavas etan ruĝan koloron ene siaj nigrecoj. Liaj dentoj malbonas. Mi divenas ke li trapasis malagrablaĵojn. Li ne tute foriĝis de tiu stato kaj li ne volis ke sia frato falus en tian vivmanieron.

Ek de la momento kiam ili eniris en la ĉefan ĉambron, li donas leteron. Mi vidas tremolon en lia mano.

Mi tralegas rapide la leteron kaj demandas al MUSTAFA:

-MUSTAFA tiu letero estas por ciaj gepatroj por informi ilin pri cia foresto de la kursoj, tio estas la tria alvoko!

MUSTAFA rigardas min silente kaj sin turnas al sia granda frato. .... mi legas laŭte.

-----  
Instituto sankta Luko Gesinjoroj  
1000 Bruselo Strato.....  
1030 .....

Estimataj gepatroj,

Ni sendis al vi tri alvokojn pri la neĉeestado de via filo MUSTAFA.

Tiuj alvokoj restis sen reagoj de viaj flankoj.

Ni bedaŭras anonci lian senrevenan forpelson el nia lernejo.

Bonvolu ricevi .....

-----  
Mi ŝajnis relegi kun espero trovi la taŭgajn vortojn.

Dum kelkaj sekundoj mi nenion diris, silente mi pripensis tian leteron.

Forestigo senrevena el la lernejo? La vortoj estas klaraj. Mi ne vidas kion fari. Kion diri?

Mi rigardas MUSTAFAn.

-Kion pensis ciaj gepatroj?

La junulo malsuprenirigas la okulojn kaj la granda frato respondas tuj dum la sekundo.

-La gepatroj scias nenion, MUSTAFA kaptis ĉiujn leterojn ek ilia alveno.

-Ne kredeble!

Tie ĉi, mi dividiĝis inter pluraj sentoj.

Unue kolero.

-Sed finfine, MUSTAFA, tio ne estas inteligenta.

Ankoraŭ scivolemo demandas min.

-Sed mia etulo, kial ci ne plu iras ĉe la kursoj? Kaj ciaj gepatroj neniam rimarkis? Kaj kion ci faris dum tiu tempo?

Sed mi malkuraĝe plenita, mi ĵetas la brakojn al la ĉielo por komprenigi al ili ke mi kapablas nenion fari por ili.

RIDUAN la plej aĝa, ne lasas la aferon:

-Fakte, FRANCINE, tio kulpas la profesora striko dum unu semajno: la kursoj ne okazis.

-Kaj?

-Kaj kiam profesoroj revenis kaj redonis kursojn, MUSTAFA, al kutimita, ne reiris al la lernejo.

-Kaj?

-Kaj la gepatroj rimarkis nenion, ĉar MUSTAFA matene foriras la domon tiel kutime kaj same revenas vespere kvazaŭ li iris al la jursoj. Kaj li kaptis la du unuajn leterojn pri neĉeesto en la lernejo la du unuaj semajnoj.

Nun li timegas, ĉar la letero parolas pri senrevena forpelo. Fortĵetado.

Mi rigardas ilin du, mi sentas min vere senutila, sen potenco. Mi povas nenion fari. Mi havas neniun kvaliton por interveni:

-Mi eĉ ne konas vin. Tio estos tuj perdita.

Bone ili gajnis!

Fakte mi emociis pro iliaj fidoj kaj estas tuŝita pro la akompanado de la granda frato. Pro lia protektanta sinteno. Pro lia respondeco.

-Kion vi volas ke mi faru?

La junuloj levis kune siajn ŝultrojn kaj demandema silento trapasas la kuirejo.

-Mi parolos al viaj gepatroj por mildigi ilin.

Kun angoro en la voĉo. Ili ekkrias samtempe, demandante ke mi ne faru.

-Ne, tute ne, FRANCINE, la patro mortigos nin.

Supertedita, mi finas lanĉante ke la nura afero, kion mi povus fari, estas ke mi telefonos al la direktoro. Sed mi konfesas kun firmeco ke mi dubas. Mi havis kelkajn spertojn kun lernejoj direktoroj de la infanoj de miaj kvartaloj. Kaj iliaj sintenoj ne kuraĝigas min.

Malgraŭ la klareco de miaj paroloj, la du junuloj foriras la domon kun malpezo. Mi kontraŭe eksentas pezadon sur mia stomako. Kion mi demetas dank' al bona vina botelo. La koloro kaj odoro de tiu miraklo skuas la esperon preskaŭ ĉielan, sed tamen tia ĉiela espero.

La morgaŭon, ĉe la laboro, sekrete mi decidis telefoni al la lerneja direktoro. Fakte mi timas liajn malĝentilajn pripensadojn kaj tiujn de miaj kolegoj.

-Bonvolu?

)Mi deziras paroli kun la direktoro de la humanisma sekcio.

Mi iomete atendas, mi timegas, mi ne tro scias kion diri, kiel prezenti la aferon.

Mi estas ankoraŭ perdita en miaj pensoj kiam, firma kaj varma voĉo remetas min en la realecon.

Spontanece mi iras rekte al la trafo.

-Ha, jen, mi telefonas pri la infano MUSTAFA,

Mi ankoraŭ ne finis mian demandon ke la direktoro demandas min kun intereso.

-Ha! ĉu vi estas la patrino?

-Ha, ne.

-La granda fratino?

-Ne pli, mi estas simple najbarino. .... mi volis demandi al vi rekonsideri la forĵeton el la lernejo de tiu infano.

-Ha. mi vidas simpatia najbarino! Dankon sinjorino, pro via klopodo favore al MUSTAFA.

Vi sciu ke tiu infano estas multe ŝatata de ĉiuj kaj tiu posedas multajn artajn kvalitojn.

Sed mi revas! Fakte mi ne kredas miajn orelojn! Ĉu estas la lerneja direktoro kiu parolas tiel ? Ĉu li konscias, tiu direktoro, ke mi parolas por iu el tiuj etuloj konsiderita tiel belgamaroka infano, "deliktulo?"

-Mi atendas vin morgaŭ je la naŭa, kun la infano MUSTAFA. Via nomo estas???

-FRANCINE B.

La direktoro enirigas nin ĝentile kaj alparolas rekte al MUSTAFA demandante la kialojn de siaj forestoj.

Je mia granda miro, MUSTAFA ne hezitas kaj klarigas kion li faris , tute simple post la fino de la profesora striko. Li ne revenis al la lernejo kaj aldonas ke li al kutimiĝis al la movadoj de la stratoj. Kaj li ŝategis tiujn. Kun kekaj amikoj ili estis je la margeno de la societo.

Kiam li konsciis pri la stulteco de sia sinteno li ne povis ŝanĝi kaj ne kuraĝis reveni en la klason laŭ normala sinteno.

Li pardonpetas kaj deziras repreni la kursojn.

Mi rigardas la direktoron kiu aŭskultas kun granda intereso la klarigon de la junulo klarigante fajne sian devojigan iradon. La direktoro reprenas la parolon:

-Bone MUSTAFA , jen kion mi proponas al ci . Ci skribos tiun diraĵon klarigante la kialon de via foresto de la kursoj dum tri semajnoj kaj kion vi faris dum tiu tempo.

Konsentite? Sed mi signalas ke mi ne estos la sola por decidi de cia eventuala reveno en la kursojn. Ha, jes. Priatentu ortografion!

MUSTAFA rigardas min timigita, ŝajnante diri ke li nulas pri ortografio. Mi lin rigardas kaj klinokulas kunkulpe.

Je la momento kiam ni forlasis la oficejon MUSTAFA turnis sin al la direktoro kaj ekde la komenco de la diskutado enestas en siaj okuloj:

-Sinjoro direktoro, pri miaj gepatroj mi volus.

-Konsentite MUSTAFA mi komprenas. Ne timu kaj pripensu al la tasko.

MUSTAFA kaj mi eliras lernejon kaj marŝas digne sur la strato.

Nia sinteno reflektas repensadon iomete artefaritan dum daŭra silento.

Ek de la momento kiam ni alvenis post la angulo de la strato, ni ne plu vidas la lernejon.

Ni nin regardas unu la alian kun festa luminado en la okuloj kaj eksplodas pro ĝojo sen iu ajn moderigo;

ni saltas grandpaŝe levante la brakojn al ĉiaj direktoj en la strato.

MUSTAFA senpezigita, mi feliĉas; la pasantoj rigardas nin iom mirigitaj.

-Jen FRANCINE ... rigardu la taskon kiun mi skribis, mi ne tro scias, ĉu estas tio kion deziras la direktoro? Kion vi pensas pri tio?

Mi legas la tekston serioze kaj relegas laŭte.

Enestas multaj ortografiaj eraroj.

Sed ĉefe ĝi estas bona kaj bele rakontita.

Sed por mi, mi trovas tion genian.

Tiun vesperon, la sono de la sonorilo milde sonoras, ĝoje kaj mature plena.  
MUSTAFA kies okuloj lumas ĉie. Li reiris al la lernejo, la direktoro kongratulis lin pro lia teksto.  
Kiel li belas MUSTAFA kun interna rideto kiu briligas siajn okulojn.  
La junulo serĉas en sia kajerujo.  
-FRANCINE, mi havas donacon por vi.

Tie, mi iom elreviĝis, mi ne volas donacadon, mi jam havas tiom, tasojn, glasojn, belegajn pladojn, teujon k.t.p.

-Ci scias MUSTAFA mi ne.....

La junulo donas paketon, mallerte pakita, iomete ĉifita. Mi kiu havas nenion por prizorgi donacojn, mi tamen demandis min.

Kaj dum MUSTAFA aperigas donacaĵon, li klarigas ke li desegnis sian historion laŭ desegna rakonto, kiun ni faris por vi. FRANCINE;

-Mi nomis ĝin: LA NE VIZITADO DE LA LERNEJO.

-En tiu mi rakontas miajn spertojn en la stratoj, tio estas la sama teksto kiun mi donis al la direktoro sed tio estas desegnita.

-Mirinde! MUSTAFA estas la plej bela ofertaĵo kiun ĝis nun mi ricevis.

Kelkaj jaroj poste, mi renkontis MUSTAFA en mia strato. Vestita per nigra jakso, tre honore vestita, pure blanka ĉemizo, li lumis per sia sinteno.

Li promenadis brako subtenante maljunulon kun longa blanka robo; oni povus pensi ke li rekte venis el la dezerto. MUSTAFA aldiris min, mi prezentas al vi mian patron.

-Kaj aldiris al li flustre kelkajn vortojn ĉe lia orelo kaj la viro rigardis min.

Mi trairas la straton por saluti ilin, mi ankaŭ scivolemis kio okazis al MUSTAFA, kio li fariĝis. Li konservis la saman vivecan scivoleman rigardon de sia matureciĝanton, kun iomete pli humoro en siaj okuloj.

La maljuna sinjoro odoras la dezerton, kaj ĝian sablan venton kaj la saĝo de sia sinteno eliras de li;

-Tiu estas mia patro.

-Kaj tiu lasta fieras pri la lasta de siaj infanoj.

-FRANCINE, vi scias ke mi laboras ĉe eldoneja domo pri desegnaj rakontoj.

Je la momento de foriro, MUSTAFA turnas sin al mi kaj diras ĝoje timigite:

-FRANCINE, helpu min, mi edziĝos morgaŭ.

-MUSTAFA, en tiu kazo, mi povas nenion por ci. Bonan ŝancon.

La scivolema patro rigardis min dum longa tempo: ankoraŭ hodiaŭ mi pripensas al MUSTAFA kaj al lia patro.

## Ni volus vidi la maron.

-FRANCINE, ni volus vidi la maron, ĉu vi povus nin akompani?

LEILA, de la vidalvida domo, mi ofte vidis ŝin kun ŝia fratino NAIMA.

Ŝi sentas mian heziton. .... kaj tuj, antaŭ kiam mi povus malfermi la buŝon, ŝi lanĉas fajnajn argumentojn kiuj pensigas min:

-Kun NAIMA, ni bezonas aerumi nin. Por vi ankaŭ. Estus tro bone FRANCINE. VI VIDOS!  
Se vi akompanus nin, la gepatroj konsentus. Ili scias nin sekuraj kun vi! Ni prenos KARIM,  
MALEK kaj la etulojn, oni tiom deziras eskapi el la kvartalo.

-Konsentite por tiu ĉi sabato se viaj gepatroj konsentas. Mi fidus al vi por prepari ĉiojn necesajojn.

-Dankon, FRANCINE, NAIMA kaj mi prizorgos nutraĵojn.

Jen ni pretas. Ni aliras stacidomon. La okuloj de la du fraŭlinoj feliĉas. Ili portas sakojn en kiuj estas banaj vestaĵoj kaj nutraĵoj por iliaj fratoj. Ili vestis sin diskrete kaj portas agrablan kapkovrilon.

Ni elektas vagonon preskaŭ malpenan kaj rapide, ni instalas nin kviete. Mi admiras ilin pro ilia kvieteco, dum iliaj okuloj estas samtempe ĉie kaj fore.

Iom post la ekmovado de la trajno, la infanoj sin levas kaj kuras al ĉiuj direktoj. Mi malfacile retenas ilin. Pro ilia ekcitado, iri al la maro eksplodas de ĉie.

Mi pensis: eble mi konsentis tro rapide, sen bone pripensi la aferon. Kaj se iu malbonaĵo alvenus?  
Kaj se mi perdis infanojn?

Post du aŭ tri movadoj, la du grandaj fraŭlinoj, NAIMA kaj LEILA, formetis kaptukon el siaj hararoj, plej belaj ol kutime.

Ili movigas ŝultrojn dancante. Ili sendas ilian senton kiu resaltas en ŝiajn okulojn. Ili aspektas famkonatajn aktorinojn.

Ili belas tiel floroj kiuj fieras laŭ ĉiaj flankoj, per naturaj per facilaj kantantaj korpoj.

Mi sentas ilian alvokon al la vivo kiu krias ĉie. Mi miras preskaŭ paralizita dank' al la vera beleco de ilia spontaneco. Ili nodas la tukon ĉirkaŭ sia kokso. Kaj laŭ ritmo de la trajno ili dancas. La etuloj estas kaptitaj per imitado de siaj grandaj fratinoj. Iliaj korpoj ne plu restas sen movoj kaj ekdansas.

Mi nature transiris, per tiu sinteno en la trajno, kun vojaĝantoj en revan mondon. Mi ne scias kiel reagi, mi observas.

Je mia granda miro, la kunvojaĝantoj varme ŝatas. Eĉ la biletkontrolisto ĝentile malfruas iomete kun ni kaj admiras la dancan evoluon de la knabinoj. La fratoj frapas la manojn je la ritmo de trajno kies bruo resonas kvazaŭ milda melodio.

La infanaj okuloj alportas, el fore, ion al kio alvokas nin. Pura ĝojo elirita de iliaj korpoj vibrigas min.

Post OSTENDO, ni veturas per tramveturilo al la marbordo. Tie ni instalas nin sur la sabla bordo. Tuj la knabinoj metis siajn banvestaĵojn. Ili tiel belas, ili malkovras sablon, kontaktiĝas kun ĝi, eĉ

sin rulas sur ĝi. Sed multaj meduzoj sidas sur la sablo, la infanoj rigardas ilin, kiuj brilas strange, ili eĉ tuŝas kaj returnas tiujn bestetojn .

KARIM kaj NAIMA kverelas, mi ne antaŭvidis tion, mi ne sciis kio okazis sed dum ilia disputo NAIMA ĵetis meduzon al KARIM ,sed ĝi falis sur MEHDI kiu ricevis ĝin sur sian sekson. Mi tute timigita provis solvi la problemon, sed la infano kriegas pro doloro, lia sekso nigriĝas. Mi aŭdis multon pri meduzoj, pri ilia urtika potenco, ili enhavas ian elektran potencon. NAIMA kaj KARIM estis tiel okupitaj de sia kverelo ke ili ne ekvidis la doloron de sia viktimo MEHDI pro sia kverelo.

LEILA helpas min konsoli kaj kvietigi MEHDI. Mi rimarkas ke lia sekso bluiĝas, tio malkvietigas min. Ĉu mi ne devus ekzameni lin de kuracisto.

Mi sidas kaj prenas lin inter miaj gamboj, la etulo ploretas. Mi lulas lin milde, kiel mi estus faranta al mia infano.

Tiu milda paŭzo haltas tuj kiam pilko ĝenas MEHDI, tuj la infano leviĝas kaj piedfrapas la pilkon. Li kunigas kun HIŜAM por konstrui sablan kastelon. Mi helpas ilin, mi plonĝas manojn en la sablon sub la kastelo por konstrui kelojn. Mi ŝategas kaj amuziĝas infanece.

Kiam mi levas la kapon, la knabinoj foriris. Mi akre rigardadas ĉien sur la sablobordo, mi ne vidas ilin. Mi kuras al la digo pensante pri ia danĝero (la infanoj ŝtelitaj, lastatempe en Belgio). Tio maltrankviligas min. Mi serĉas ĉien. MALEK kaj KARIM helpas min, ni traserĉas la du knabinojn al ĉiaj direktoj.

Kie ili povus esti?

-Oni trovis ilin, FRANCINE.

Mi feliĉe vidas ilian revenadon; ili ridas kaj estas sen vundoj, sur pedalveturileto. Kun du fraŭloj dek kvin jaraj de nia kvartalo: tiel belaj: mi spiras profunde, trankviligita.

NAIMA aldiras:

-Estas genie FRANCINE, estas junuloj de nia kvartalo.

Ĉiuj estas feliĉaj ĉar ili renkontis konatulojn de nia kvartalo. Mi ne kuraĝas moraligi ilin. La tago forpasas bonhumore.

Kiam ni alvenas ĉe la trajno akompanataj de la sabla odoro, la infanoj radias kaj estas lacegaj pro feliĉo.

La du fraŭlinoj remetis siajn tradiciajn kaptukojn kaj vestaĵojn tiel kiel ili estis je la forirado el la gepatra domo. Ili estas ĉarmaj ne kaŝante sian belecon.

-FRANCINE, dankon, tio estis belega.

JUNES la plej juna de SALMA, havas sur sia vizaĝo esperan kotentiĝon kiel siaj gefratoj. Kaj kiam mi lin rigardas mi sentas bonvivan feliĉon dank' al sia forto trovi sian taŭgan justan lokon.

Mi ricevas la vivan blovon de la infanoj de la vidalvida domo kiel marketoj de la suno de mia kvartalo. Iliaj suferoj, scivolemoj, iliaj kontraŭbataloj en tiu ĉi senkompata societo, ilia volo sukcesi, ilia fido al mi.

Estas kvazaŭ la ĉielo plenigus ĉiujn infanojn per steletoj kaj tiuj infanoj de la vidalvida domo estas miaj steloj.



Ek de la foriro de la entrudiĝinto, mi reordigis ĉion en mia ekzistado.

La infanoj de la vidalvida domo estas por mi sakraj. Ili prenis mian vivajn malfacilaĵojn sur siaj ŝultroj sen eĉ scii tion.

Same mi partoprenis al iliaj naskiĝoj sen ĝin voli.

De la etuloj ĝis la plej kreskitaj infanoj de la vidalvida domo, ni naĝas kune en la ĉiutaga realeco. Malfacile, kelkfoje ĝenege, sed ĉian fojon, kiel floso feliĉo falas sur nin, kaj nin savas de la mizero en tiu ĉi suba mondo.

La infanoj de la vidalvida doma familio helpas min trovi fortojn por daŭrigi mian vojon. Kaj mia dometo estas por ili eta lumo en malhelaj tagoj.

## Epilogo.

*NAIMA, KARIM kaj MALEK trapasis en trueton ekvilibre sur la flanko de granda puto de la delikto. Sen neniam fali en ĝin.*

*Por ne fali en tiun socian puton, ili kuraĝis laŭ bona senca inteligenteco kaj honesto.*

*SALMA kaj JUSEF esti ĉie por helpi la infanojn antaŭ la metitaj obstakloj kaj antaŭ la malkuraĝo kaj malakcepto,*

*La infanoj de la vidalvida domo iĝis partoprenantaj adoltoj en nia socio.*

*La realaĵo de la infana vivo en tiu skarbeka kvartalo dancas fortege en ilia memoro kaj en la mia.*

*Nun kiam mi pripensas al tiuj travivitaj momentoj, al ĉiuj tagoj kun tiu familio veninta de alia mondo, mi ĉiam sentas en mi sunon kiu varmigas mian tutan korpon, je la komenco de miaj maljunaĝaj tagoj.*

## INDEKSO

<i>Paĝo 1 Titolo / Aĉeto de dometo</i>	<i>Paĝo 21 Juna viro sen nomo</i>
<i>Paĝo 3 Infano falita d la ĉielo</i>	<i>Paĝo 23 Alaha infanoj</i>
<i>Paĝo 5 Hiŝam</i>	<i>Paĝo 24 Edziĝa demando</i>
<i>Paĝo 6 Iu sabato</i>	<i>Paĝo 25 La Entrudiĝinto</i>
<i>Paĝo 8 Malbona lernanto</i>	<i>Paĝo 27 Tagoj trapasas</i>
<i>Paĝo 10 Lerneja vojaĝo</i>	<i>Paĝo 29 La tria oktobra Vespero</i>
<i>Paĝo 12 la Mono</i>	<i>Paĝo 32 Kulera bruo</i>
<i>Paĝo 13 Estas preskaŭ meznokto</i>	<i>Paĝo 34 Mustafa</i>
<i>Paĝo 14 Ramadan</i>	<i>Paĝo 39 Ni volus vidi maron</i>
<i>Paĝo 15 Ferioj ĉe JOJO</i>	<i>Paĝo 41 Epilogo</i>
	<i>Paĝo 42 Indekso</i>

Mi provis traduki sen perfidi la aŭtoran pensadon, mi pensas ke mi preskaŭ sukcesis, tamen ĉar la senco de la vortoj ĉe iu ajn lingvojn malsimilas, povas okazi ke la uzataj vortoj por tradukado ne plus similas. Tamen mi esperas ke ili ne perfidis.

Jen honesta kaj simpla travivaĵo de virino kiu malgraŭ vivaj malfacilaĵoj trovis tamen tempon kaj okazon prizorgi kaj helpi junulojn kaj permesi al ili akordiĝi kun socia vivo. Ŝi provis vivi laŭ la naturaj leĝoj tio estas laŭ la Dia leĝo, kaj sekvis koridoron de la socia vivo kiu religas ŝin al la socio kie ŝi vivas tio estas religio, eĉ se ŝi diras la kontraŭon?

Neniu devigis ŝin tamen pro socia ŝato ŝi faris sen antaŭjuĝi kaj kun plenplena da ŝato.

Kelkaj el ni estus preta juĝi sian moron, pro tio konsiderita kiel peko?

Sed tiu kiu neniam pekis ĵetu la unuan ŝtonon.

Mi tute rifuzas juĝi, ĉar antaŭe kaj unue mi nepre devas juĝi min, kaj forĵeti miajn malbonajn pensojn, kiel ĉiuj el ni.

Kaj tiel dirus muzulmano: kontraŭbatalu viajn demonojn en via kapo kaj forsendu ilin el via kapo, laŭ vera ĝiado; Ne en kapo de aliulo sed el via kapo mem!

Tiu virino estu benata!